

EL POPOLA ĈINIO


中國新道

6

1980




Ni amas
sciencan
de
la infaneco




Enirejo de la ekspozicio



Absorbitaj geknaboj



Komputero regata per sono



Cibernetika roboto



Plurtembra elektronika orgeno

En la Beijing-a Ekspoziciejo okazis "Tutlanda Ekspozicio de Sciencaj kaj Teknikaj Kreaĵoj de Geknaboj", en kiu pli ol 3,000 objektoj estis ekspozitaj. La kreaĵoj ampleksas multajn fakojn de astronomio, meteologio, geografio, akustiko, optiko, fiziko kaj matematiko. La ekspozicio montris la aktivecon de la geknaboj en lernado de scienco.

Ĉiutage dekoj da miloj da geknaboj ĝin vizitis kaj montris grandan intereson al la ekspozitaĵoj.

Fotoj de SUN ZHIJIANG kaj XIN YINGYI



Planetario de tipo SM-1



Modelo de kosmošipo

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Juna fiŝistino

BILDPAĜOJ:

1 KOLORA SERIO

Ni amas sciencon de la infaneco

2 NIGRA-BLANKA SERIO

Restarigo de reputacio de kamarado Liu Shaoqi

3 KOLORA SERIO

La Tibeta Altebenaĵo

4 NIGRA-BLANKA SERIO

Fiŝistoj de Shantou

5 KOLORA SERIO

(1) Naŭdraka Ekrana Muro en Beihai-parko

(2) Leonoj en la Imperiestra Palaco

(3) Fotografiaj verkoj de esperantistoj

SUR LA DORSKOVRILO:

Viola orkideo

Enhavo

Por savi krimajn gejunulojn	2
KARIKATURO	3
Ili hieraŭ kaj hodiaŭ	4
Juna generacio en progreso	7
Pri la zorgo de kamarado Chen Yi al la Esperanta laboro	10
Restarigo de reputacio de k-do Liu Shaoqi	12
Tutkora gratulo	13
Nova konstanta komitato de ĈEL	14
Esperanta traduka ekzercado	15
Rememoro pri kamarado Xu Ziqi	16
La perspektivo de la monda ekonomio en la okdekaj jaroj	17
KORESPONDI DEZIRAS	18
Teknika Reformado de la Tekstila Industrio de Shanghai	19
Harbin-a Postlabora Universitato de Laboristoj	23
VIDINDAJ LOKOJ: Pejzaĝoj de Tibeto	25
Vipura Insulo	28
Baleto "Ĝaŭŝutun kaj Nannona"	30
Parfuma Rozo (Novelo)	33
TRA ĈINIO: Nova industria urbo Xiangfan	37
KURANTAJ AFEROJ	40
KULTURAJ NOTOJ	41
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Antikvaj pentraĵoj en la Muzeo de Imperiestra Palaco	42
AMIKECO: Pri edziniĝo de Huan Huan	45
Memore al la granda muzikisto Ŝopeno	48
ESP-NOVAĴOJ	50

Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Por savi krimajn gejunulojn

Pluraj legantoj demandis nin, ĉu troviĝas en Ĉinio krimaj gejunuloj, kaj kiel ilin traktas la registaro.

Ankaŭ Ĉinio alfrontas la socialan problemon de krimofaro de junuloj, sed ĝi ne montriĝas tre serioza. La geknaboj estas floroj de la patrolando, kaj la krimaj geknaboj estas kvazaŭ floroj malsanaj aŭ ronĝataj de insektoj. Se ĝardenistoj forigas la insektojn kaj zorge flegas la florojn, ili denove fariĝos belaj.

Statistiko pri 12 ĉinaj grandaj urboj diris, ke la nombro de iliaj krimaj geknaboj en la tria trimestro de 1979 estis 12,000. Kompare kun la geknabaro de tiuj urboj, la nombro de krimaj geknaboj estas malgranda. Tamen ĝi estas pluroblo de tiu en la jaroj antaŭ la kultura revolucio.

Nuntempe la ĉefaj krimofaraj kazoj de geknaboj estas intergrupaj luktoj kaj ŝtelo, dum tiuj de murdo kaj seksatenco estas malmultaj. En Ĉinio ne troviĝas toksigemuloj kaj apenaŭ okazas krimofaro pro ebriiĝo.

Kio puŝas geknabojn al krimofaro? Ĉefe la putraj kaj posttigitaj ideoj postrestintaj el la malnova socio kaj anarkiismo. Kaj tiuj postrestaĵoj ne estas facile elimineblaj. Kiam komenĉiĝis la kultura revolucio, la hodiaŭaj gejunuloj estis infanoj.

Tiam furoris anarkiismo kaj ofte okazis batado, detruoj kaj raboj, kaj tute inversiĝis pravo kaj malpravo, bono kaj malbono. Kaj pro tio multiĝis krimofaroj de geknaboj.

Kaj krome, ĉe la renversiĝo de la kvarpersona bando, la ĉina nacia ekonomio preskaŭ disfalis. Kvankam la ŝtato faris grandan klopodon por rebonigi la fuŝitan ekonomion, tamen ĝi ne povis havigi laboron samtempe al ĉiuj gejunuloj. Parto de la senlaboraj gejunuloj tute eniĝis pro senokupateco, kaj ili degeneris ĝis krimofaro.

Alia grava kialo de multiĝo de krimoj estas, ke estis tute neglektitaj distraĵoj konvenaj por gejunuloj. Kaj la gejunuloj ne estis bone prizorgataj en libera tempo.

Post la renverso de la kvarpersona bando en oktobro de 1976, la Partio kaj la registaro aplikis efikajn rimedojn por eduki kaj savi la krimajn gejunulojn. En tiu laboro oni plene utiligis la fortojn de la socio kaj kolektivo, uzis diversajn formojn, atentis la memrespekton de gejunuloj kaj varmkore helpis ilin konscii kaj korekti siajn erarojn.

Apenaŭ gejunuloj montris inklinon al malbonfaro, membroj de loĝantara komitato, iliaj instruistoj kaj gepatroj tuj faras al

ili pacienca admonado. Tiu metodo estas ĝenerale aplikata en multaj urboj. Kaj en tiu flanko la urboj Chongqing (Ĉongking) kaj Wuhan (Vuhan) montriĝis pli avangardaj. En Wuhan organiziĝis 4,000 grupoj el 16,000 kadroj de loĝantaraj komitatoj, instruistoj, policianoj kaj gepatroj. Ili pacience edukis la krimajn gejunulojn, disigis la bandojn de malbonaj junuloj, forprenis de ili batalilojn kaj akiris informojn por solvi multajn krimajn kazojn helpate de tiuj gejunuloj. Kaj dank' al la edukado de tiuj grupoj multaj el ili reboniĝis.

En fabrikoj kaj minejoj, oni metis erarintajn gejunulojn en avangardan grupon. En bona medio, tiuj gejunuloj povas konscii kaj korekti siajn erarojn. Tiu aranĝo tre bone efikas. Mi prezentu ekzemplon. En la Hangzhou-a Maŝinfabrika estas juna laboristo Tao Yinlu. Li iam volis distingiĝi per siaj pugnoj kaj fariĝi "heroo". Li detruis multajn objektojn de la fabrika manĝejo. Post sia aliĝo al avangarda grupo, li tute ŝanĝiĝis kaj fariĝis antaŭiranto en produktado.

Geknaboj farintaj pli gravajn kulpojn estas senditaj en laboran-lernan institucion. Nun grandaj urboj de nia lando havas po plurajn tiajn instituciojn. Tie laboras spertaj instruistoj kaj

oni rigardas la kulpulojn ne kiel malliberulojn sed edukatojn. Post korekto de siaj eraroj, ili povas reveni en sian antaŭan lernejon, partopreni en ekzameno por eniri en altan lernejon, aŭ akiri profesion.

En labora-lerna institucio la lernantoj uzas duonon de la tempo por lernado, kaj krome ili devas bredi kortobirdojn kaj kulturi grenon kaj legomojn, aŭ fari maŝinpecojn. La produkta laboro komprenigis la lernantojn, ke la sociaj riĉaĵoj estas

kreitaj per peniga laboro kaj ke rabo kaj ŝtelo estas hontindaj agoj. Multaj lernantoj rapide progresis post fizika laboro.


La klopodado de la socio akre malmultigis la kazojn de krimofaro de geknaboj. Geknabaj deliktuloj en nia lando ne estas kondamnitaj ĝenerale. Ili estas senditaj en geknaban edukejon. Preskaŭ ĉiuj provincoj havas tiajn edukejojn.

La edukejoj akceptas geknabojn en aĝoj de 14-16 jaroj kaj la

eduka tempo estas 2-3 jaroj. En la edukejo la geknaboj estas enklasigitaj laŭ sia klereco. La edukado enhavas tri kategoriojn de politiko, kulturo kaj laboro. La geknaboj sin transformas dum fizika laboro kaj samtempe lernas teknikojn, kio ebligas al ili glate plenumi profesiajn laborojn post forlaso de la edukejo.

La edukejo ne havas armitajn gardistojn. Por preventi rekri-

(Daŭrigo sur p. 16)




Genia Pentristo

pentrita de CHI XING


KARIKATURO

pentrita de YU SHIDUO



Vere Malfacile

pentrita de NA ERJIAO





Ili hieraŭ kaj hodiaŭ

— Pri labora-lerna institucio de Beijing

LA laboraj-lernaj institucioj funkciigataj en iuj urboj de Ĉinio estas laŭdataj kiel specialaj kuracejoj por spiritaj vundoj de krimaj geknaboj. Kun scivolemo mi vizitis tian lernejon en la Okcidenta Distrikto de Beijing (Pekino).

FLOROJ POLVOKOVREDITAJ

Enirinte la lernejon mi ricevis la impreson, ke ĝi ne niom diferencas de la ordinaraĵoj: La knaboj estas viglaj kaj estas disciplinaj prenante lecionojn, sin amuzante aŭ pilkludante. Sed kelkajn tagojn poste, mi fariĝis malserena, informiĝinte ke antaŭe ili faris perfortaĵojn, ŝtelojn kaj obscenaĵojn, kaj komencis abomeni ilin.

Tamen min kortuŝis vortoj de la maljuna rektoro Wang Shengchuan. Li diris: “Antaŭe ili estis bonaj, naivaj geknaboj, sed poste ili faris erarojn pro influo de malbonaj agoj kaj pensoj en la socio aŭ pro nekonvena eduko de la lernejo kaj familio. Nun ni devas esti sinceraj al ili kaj amzorgi ilin. Tia amo ne estas ŝajnigita kaj uzata kiel rimedo sed sincera el la koro.” Li ankaŭ rakontis al mi interese, kiel li ŝanĝis sian opinion pri ili. Li diris: “Antaŭ pli ol 20 jaroj, en

vesper-kunveno la geknaboj dancadis kaj kantadis ĉirkaŭ tendarfajro kaj mi silente observis ilin apude. La luno kaj flamoj brilis sur iliaj naivaj amindaj vizaĝoj, ke mi vidis la propran fizionomion de ilia animo. De tiam mi ekamis ilin.” Kaj per sia sincera amo li kaj ĉiuj aliaj instruistoj savis multajn geknabojn kaj ricevis laŭdojn de iliaj gepatroj.

Rektoro Wang kaj iuj instruistoj prezentis al mi kortuŝan scenon de premi-dona kunveno. Ĝi estis okazigita de la lernejo en la 1-a de majo, 1979, por premii bonkonduktajn lernantojn. Pli ol 30 aktivuloj kun ruĝa silka floro sur la brusto sidis sur la podio. La vivecaj ekzemploj pri ilia ŝanĝiĝo emociis multajn gepatrojn kaj instruistojn ĝis larmoj.

Antaŭ kelkaj monatoj, unu el la premiitoj, la 17-jara Xu Miao, venis en la lernejon kun aliaj dekelkaj geknaboj kaj miris, ke tie ne troviĝis policianoj kun pafilo, nek altaj muroj kaj mallumaj ĉeloj . . . Ŝi eniris klasĉambron kaj vidis jenajn vortojn sur la nigra tabulo: “Polvokovritaj floroj ricevas ĝustatempan pluvon; persikoj, prunoj baniĝas en printempa suno.” En tiu tago printempa vento denove blovis en ŝian koron. Xu Miao progres-

sis rapide. Ŝi ricevis altajn notojn por ĉiuj lernobjektoj, senbrue faris bonojn por aliaj kaj penadis forlavi la polvojn sur sia animo per la ŝvito en fizika laboro. Jen la floro sur ŝia brusto montris, ke tiu polvokovrita floro refreŝiĝis, rejuniĝis.

Dum kelkaj monatoj, de kiam tiu lernejo restariĝis en la fino de la jaro 1978, pli ol 200 lernantoj progresis en malsamaj gradoj. Tio estis nur komenco, tamen miraklo.

KAPTI LA EKBRILOJN

En la lernejo mi vidis, ke iu seriozaspekta lernanto alta kaj maldika estas gvidanta elektadon de klasoj eminentaj en disciplineco kaj pureco. Mi informiĝis, ke li, nomata Wang Jin, estas prezidanto de la Lernanta Unio. Mi ne komprenis, kial ankaŭ tiel bona knabo kiel li estis sendita en la institucion. Kiam mi demandis rektoron Wang pri tio, li diris kun rideto: “Prefere interparolu kun li mem.”

Wang Jin ne kaŝis antaŭ mi siajn erarojn, li rakontis vortorente al mi sian travivaĵon. Antaŭ ol viziti tiun lernejon, li estis lernanto de supera mezlernejo, emis lukti kaj fari friponaĵojn. En la unuaj tagoj post sia

alveno, li sin tenis tre arogante: Li malobservis la disciplinon, intencante subigi al si la instruiston kaj kunlernantojn. Li pensis, ke la instruisto certe severe kritikos lin pro lia malbona konduto kaj li povos kapti la ŝancon por kverelegi.

Sed li tute ne atendis, ke la lernejo estas funkciigita speciale por observi kaj analizi la psikon de krimaj geknaboj kaj ŝanĝilian ideologion. Antaŭ la komenco de la nova semestro ĉefinstruisto Wang kaj vicĉefinstruisto Fu faris esploradon pri Wang Jin. Origine li ne estis malbona knabo. En la unuaj kvin lernojaroj en elementa lernejo li estis bonkonduta ĉiuflanke kaj ĉiam elstara en lernado. La ordinaraj hejmtaskoj ne sufiĉis por li, kaj lia instruisto plimultigis ilin, por ke li disvolvis sian intelekton. Sed bedaŭrinde, en la kultura revolucio la kvarpersona bando dissemis anarkiismon kaj instigis lernantojn al ribelo, kio kaŭzis grandan ĥaoson al la normala lerneja ordo. Wang Jin iom post iom malboniĝis pro manko de instruista kaj gepatra eduko . . . Tion analizinte, la instruistoj de la lernejo faris decidon tiri lin al ĝusta vojo.

Ili trovis, ke li havas fortan deziron progresi kaj inklinon de memrespekto. Iutage la instruisto taskis al iu lernanto gvidi kamlaboron. Wang Jin iniciate helpis lin en organizado de la laboro. Post tio li prezentis kelkajn proponojn por plibonigi la klason. La instruisto tuj rimarkis lian progreson kaj laŭdis lin antaŭ la lernantoj. Poste ankaŭ li estis taskita gvidi kamlaboron. Li estis kortuŝita de la konfido de la instruisto al li kaj tre bone plenumis la taskon. Baldaŭ li fariĝis monitoro. Liaj

instruistoj bone gvidis lin laŭ lia penso, daŭre helpis lin en lia laboro kaj observis liajn agojn. Ili instruis lin kiel distingi pravon de malpravo kaj bonon de malbono. Nun Wang Jin jam fariĝis prezidanto de la Lernanta Unio kaj estas elstara en lernado kaj aliaj aktivecoj. Lia progreso stimulis la aliajn lernantojn. La 1-an de julio, 1979, li ricevis la honoron membriĝi al la Komunisma Junulara Ligo, la avangarda organizo de la ĉinaj gejunuloj.

Preskaŭ ĉe ĉiu knabo troviĝas ekbriloj de pozitivaj faktoroj en ideologio. Eĉ tiu lernanto, kiu estas rigardata kiel la plej malbona, havas fortan memrespekton. Prave diris la maljuna rektoro: "Eĉ malvarmiĝinta koro iam povas elŝpruci fajron. Nia tasko estas rebriligi la memrespekton en la koro de tiuj knaboj kaj forigi la polvon kiu ĝin kovras."

KOLEKTIVA FORTO


La lernejo tre atentis pri edukado kaj kulturado de siaj lernantoj per kolektiva vivo. En la frua tempo post kiam ili eniris tiun lernejon, ili, kiel enkaĝigitaj sovaĝaj birdoj kaj jungitaj furiozaj ĉevaloj, tute ne kutimiĝis al la severa disciplino. Tamen la kolektiva vivo vere efikis sur ilin. Post ripetada eduko la lernantoj ekkomprenis, ke ili devas egalpaŝe marŝi sur la sporta placo kaj akordiĝi inter si en pilkludado por gajni la maĉon. Ili atentis pri la loko de sia klaso en la listo de honoro sur la tabulgazeto kaj iom post iom sciis kiel prizorgi sian kolektivon kaj ĝin glorigi. En ĉiu majtago okazis kunveno por honori aktivulojn. Plejparto el la pli ol 200 geknaboj rimarkinde




Lernejestro Wang Shengchuan parolas al siaj lernantoj.



En legoĉambro



En dormoĉambro



Intima interparolado



Patrino ĝoje vizitas sian filinon.

progresis dum la pasinta unu jaro. Inter ili, kvar aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo kaj pli ol 70 estis elektitaj kiel aktivuloj.

La kolektiva eduko bone efikis sur tiujn, kiuj havas malbonajn kutimojn kaj ne povas sin liberigi de ili. Cao Peng de la 7-a lernogrupo estis delonge fama pro sia luktemo. La rektoro kaj la ĉefinstruisto plurfoje kun pacienco edukis lin, sed li foje refoje faris erarojn kiel antaŭe. Iufoje li vundis la monitoron per briko. En la kunveno de la grupo liaj kunlernantoj severe kritikis lin. Kaj post la kunveno tiu luktemulo ploregis antaŭ la instruisto kaj skribis al la rektoro kaj la instruisto por esprimi sian decidon korekti la

erarojn. De tiam li sin streĉis en lernado kaj aktive plenumis fizikan laboron. Iuj lernantoj diris: “En la venonta fojo ni certe elektos Cao Peng kiel aktivulon.”

Aliaj du knaboj, kiuj rifuzis korekti siajn erarojn post ripetada eduko, ne volis submetiĝi al la disciplino kaj ŝtelis monon por vojaĝkosto. Ili fuĝis al Foshan de Guangdong-provinco, tre fore de Beijing. Nelonge poste ili skribis al la instruisto, ke ili forkonsumis la monon kaj ne povas plu sin vivteni. Tial ili petis, ke ili estu permesitaj reveni en la lernejon. La rektoro tuj ilin respondis kun konsento. Kaj ili revenis al la lernejo tre lacaj kaj maltrankvilaj. Ili apenaŭ povis kredi al siaj okuloj,

ke anstataŭ severa puno ilin atendas varma bonvenigo. Poste ili ambaŭ fariĝis promesplenaj kaj estis akceptitaj en ordinaran lernejon post unu jaro.

La instruistoj estas fidoplenaj en sia laboro kaj paciencas en edukado. Ili opinias, ke se malbonaj pensoj kondukis la geknabojn al malĝusta vojo, bonaj pensoj certe povos kuraci iliajn spiritajn vundojn kaj sane kreskigi ilin. Rektoro Wang diris al mi, ke oni fondis tiajn lernejojn en Beijing jam en 1956 sed ilia funkciado estis ĉesigita en la kultura revolucio. Nun 9 tiaj lernejoj estas restarigitaj en la urbo. El la diplomitoj de tiuj lernejoj iuj fariĝis fabrikestroj, aliaj elstaraj instruistoj kaj triaj popolaj reprezentantoj.

HONGYING:

Juna generacio en progreso

HEROINETO SUR STEPO

Iun matenon en aprilo de 1979, la 11-jara knabineto Otgen rimarkis, ke ŝia patrino devas prizorgi malsanajn ŝafojn de la produkta taĉmento, kaj petis permeson, ke ŝi iru paŝti gregon da bonrasaj kaŝtritaj ŝafoj.

En aprilo, la velkintaj herboj sur la proksima paŝtejo estis jam formanĝitaj kaj iliaj radikoj ankoraŭ ne ĝermis. Tial malgranda Otgen pelis la ŝafaron al malproksima paŝtejo nefrekventata.

La vetero sur la stepo estas kaprica. Je la 11-a horo subite leviĝis 10-grada uragano kaj la ŝafaron ĝi dispelis. Malgranda Otgen sukcesis rekolekti la gregon nur post longa penado.

Jam malheliĝis. Kiam ŝi sukcesis peli la ŝafojn al ventŝirma loko, jam estis ĉ. noktomezo. La knabineto kuradinta dum la tuta tago sentis malsaton, froston kaj doloron tra la tuta korpo. Ŝi tre deziris dormeti sin premante al ŝafoj, sed ŝi ekmemoris la vortojn de sia instruisto: "La ŝafoj estas la pupiloj de la paŝ-

Lan Qiang (la unua de dekstre)
Foto de SIMA XIAOMENG

tistoj kaj trezoroj de la kolektivo." Ŝi do revigliĝis kaj bone gardis la ŝafaron.

Post nelonge, la ventego ŝanĝis sian direkton kaj pafiĝis al la ŝafoj kiel sagoj, tiel ke ili denove diskuradis. Por grupigi ilin, Otgen kuradis kaj falis foje kaj refoje. Kiam ŝi sukcesis rekolekti la ŝafaron, ŝi fariĝis tute senforta.

Je la tagiĝo, la temperaturo sur la stepo malaltiĝis al 20°C sub nulo, kaj la ventego blovadis senĉese. Dum la tuta nokto, la paŝtistoj de la produkta taĉmento serĉadis Otgen. Iom post la 6-a, la taĉmentestro Erden Bayar la unua trovis la knabineton kaj ŝian ŝafaron. Li forte vipis la postajon de sia ĉevalo kaj galopis al ŝi. Ekvidinte sian karan taĉmentestron, Otgen ekridetis,

tamen ŝi povis diri nenion, ĉar ŝi jam tute rigidiĝis de frosto.

Post kuracado, malgranda Otgen resaniĝis. Por protekti la ŝafaron de la kolektivo, la 11-jara knabineto luktadis 21 horojn kontraŭ ventego kaj frosto kaj neniu el la 208 ŝafoj perdiĝis. Paŝtistoj multe laŭdis ŝin dirante: La aglo en la aero ne timas uraganon sur la stepo, kaj nia malgranda Otgen ja meritas la titolon "agletto sur la stepo".

PAKETO DA MONBILETOJ

Iun vesperon, kiam Lan Qiang, junpioniro de la Elementa Lernejo de Nanmofang-strato de Beijing (Pekino), haste eniris la butikon de almanĝaĵoj, la komizoj estis okupataj pri kalkulado de la enspezita mono, ĉar tuj ve-



nos la horo por fermo. Lan Qiang ĝentile diris al iu juna komizino: "Onklino, mi volas du paketojn de salo." Li ricevis du paketojn kaj reiris hejmen saltetante.

Survoje, li ludis per la paketoj ilin pesante per la manoj kaj trovis, ke unu el ili estas malpli peza. Strange! Li palpis ilin kaj rimarkis, ke unu el ili estas pli mola. Li ilin pririgardis kaj trovis, ke vidiĝas ruĝaj vortoj "rafinita salo" sur unu el ili, sed nenio sur la alia. Li rapide malvolvis la lastan kaj trovis en ĝi nur monbiletojn. Lan Qiang pensis, ke la onklino deĵoranta certe estas turmentata de maltrankvilego pro perdo de tiel multe da mono. Li tuj kuris al la butikoj kaj metis la paketon de monbiletoj sur la montrotablon dirante anhelante: "Onklino, jen paketo da monbiletoj sed ne salo, vi misdonis ĝin al mi." Kun miro kaj ĝojo la komizino tuj donis al Lan Qiang paketon da salo. Ŝi haste prenis la monbiletojn, ilin kalkulis kaj konstatis, ke nenio mankas al la 289 juanoj, kiujn ŝi ĵus pakis. Kiam ŝi levis la kapon por demandi la nomon de la knabo, Lan Qiang jam malaperis.

Post dekelkaj tagoj laborantoj de la butikoj trovis la knabon post serĉado, kaj la administranto kaj la komizino vizitis la Elementan Lernejon de Nanmofangstrato kaj prezentis dankleteron por laŭdi Lan Qiang pro lia nobla ago.

GAJNINTO DE LA UNUA PREMIO EN MATEMATIKA KONKURSO

Gao Weiqi, lernanto de la unua supera mezgrada klaso de Nankai-mezlernejo, gajnis la unuan premion per 186 poentoj

en la tutlanda matematika konkurso en 1979.

La 17-jara junulo Gao ŝategas matematikon de sia infaneco. Kiam li eniris mezlernejon, li pensis, ke la moderniga konstruado de la patrolando ne povas efektiviĝi sen scioj pri matematiko, fiziko kaj kemio. Atentante ĉiujn studobjektojn, li lernadis matematikon kun aparta diligenteo. Li trovis libron "Alta Algebro de Fine" kaj komencis ĝin studi. La teksto de tiu verko estis en klasika han-a lingvo, kiun li ne povis bone kompreni. Por venki la malfacilon, li aĉetis libron pri la gramatiko de la klasika han-a lingvo kaj komencis studi tiun libron sin helpante per vortaro kaj farante notojn. Li ofte vizitis instruiston Li, kiu bone scias matematikon, por peti lian helpon. Kiam li finis sian studon en la elementa mezlernejo, li jam sin ekzercis per solvo de pli ol dekmil matematikaj problemoj en lernolibroj pri alta algebro, trigonometrio kaj analiza geometrio.

Gao Weiqi akiris plej bonan noton en studo de matematiko kaj estis unu el la plej elstaraj lernantoj en la lernejo. Li eĉ ĝuis renomon en la urbo Tianjin (Tiangin). Sed en la matematika konkurso de ok provincoj kaj municipoj de nia lando en 1978, li ne atingis kontentigan sukceson. Post resumo de sia sperto li trovis, ke li ne metis sufiĉe firman fundamenton, sekve li donis pli grandan atenton al la fundamenta ekzercado.


Enirinte en superan mezlernejon, li komencis mem studi altan algebron sub helpo de instruisto, krom relernado de matematikaj libroj por superaj mezlernejanaj. En la lastjara matematika konkurso tutlanda li renkontis pro-

blemon neniam viditan, sed pro tio ke li havis firman fundamenton, li sukcese ĝin solvis rapide.

Post la lasta konkurso, li kaj aliaj 14 premiitoj estis senditaj en la matematikan fakultaton de la Beijing-a Universitato por daŭrigi la studon.

POR KONTRIBUI AL LA MODERNIGO DE LA PATROLANDO

Ye Huiying estas teksistino de la Dekunua Tekstila Fabriko de Changzhou, Jiangsu (Giangsu)-provinco. Kiam ŝi komencis labori en la fabriko, ŝi prizorgis 36 teksmaŝinojn, kiuj prezentis, dum sia rapidega funkciado, tiel multajn kaj oftajn laborojn, ke ŝi ne havis sufiĉe rapidajn okulojn kaj membrojn por ilin plenumi ĝustatempe. Ŝi pensis,



Ye Huiying

Foto de PAN YING

ke ŝi devas sin lertigi per ekzercado por bone funkciigi la maŝinojn kaj preventi produktadon de subnorma ŝtofo.

Kaj ŝi komencis pene sin ekzercadi pri nodado kaj reenmeto de navedoj kun tia diligenco

teco, ke ŝiaj brakoj ŝveliĝis kaj doloris al ŝi. Por bone koni kaj juĝi nenormalan funkcion de teksmaŝino, ŝi faris notojn pri "simptomoj" de milo da misfunkcioj. Kaj poste ŝi faris reformon al la apliko de rigardo kaj movoj de teksistino, al manipulado de la maŝino kaj aranĝo de laborprocedo. Ŝi lernis ne nur de la veteranoj sed ankaŭ de lertaj metilernantoj.

Dank' al sia diligenta ekzerco, fine ŝi trovis, post multaj malsukcesoj, metodojn por kontroli la maŝinon per rigardo, aŭskultado kaj palpado, kaj ŝi povas rimarki nenormalan sonon de iu teksilo en la bruego de centoj da maŝinoj kaj juĝi kio ne estas en ordo. Ŝia nova sperto aldonis novon al la avangarda metodo de teksado trovita de la labormodelo Hao Jianxiu en la kvindekaj jaroj.

Ye Huiying estis plurfoje honorita kaj elektita kiel laborheroino de Jiangsu-provinco kaj labormodelo de la tuta lando. Ŝi tamen neniom fieriĝis aŭ kontentiĝis pri siaj atingoj, kaj ŝi ofte helpadis entuziasme siajn kamaradinojn instruante al ili teknikojn kiujn ŝi scipovas. Ŝi diris: "Bonkvalita kaj altkvanta produktado de unu persono signifas nur malgrandan pliiĝon, sed helpo al ĉiuj por fari tian produktadon signifas multobliĝon kaj per tio oni povas fari pli grandan kontribuon al la modernigo de la patrolando."

JUNULO EN BATALO KONTRAŬ INCENDIO

Iutage en la komenco de la kuranta jaro, fajrero estigita de iu argano ekbruligis kotonon en la kotontenejo de la Kvara Kotonŝpino de Shijiazhuang kaj baldaŭ leviĝis fumkolono. La



Ilustrita de LIU HE

brikaj kolonoj de la tenejo kreviĝis en la flamoj kaj dispeciĝitaj asbestaj tegoloj falis de sur la tegmento. Baldaŭ alrapidis la fajrobrigado kaj fortaj akvokolonoj jetiĝis al la incendio.

Multaj laŭte kriis: "Savu la kotonon!" Juna laboristo Yu Zhibin sin jetis autauen. Homoj tuj ĉirkaŭis la amason de kemiaj fibroj altan je pli ol 4 metroj, kaj en malpli ol 30 minutoj la 130 tunoj da kemiaj fibroj estis forportitaj. Ĉe la nordokcidenta angulo de la tenejo plej furiozis flamoj kaj amaso da kemiaj fibroj jam fariĝis kovrata de flamoj. Wang Jianwei, sekretario de filio de la Komunisma Junulara Ligo kaj iu alia juna laboristo direktadis, sur la amaso, la akvoŝprucigilojn en la lukto kontraŭ la incendio.

La nobla tasko de savado de la ŝtata posedaĵo urĝe mobilizis la laboristojn al sinforgesata batalo kontraŭ la fajrego. Rimarkinte ke la kanvasa akvotubo el-lasas akvon, altstatura knabino Yao Ying tuj demetis sian vatican veŝton kaj volvis per ĝi la tubon. Dum estingado de la fajro per akvoŝprucigilo, juna ŝoforo Zhao Zibin svenis pro la sufoka fumo, la 18-jara laboristo Ma Aiqiang tuj transprenis la akvoŝprucigilon por daŭrigi la batalon.

La fajrego estis estingita kaj 400 tunoj da materialoj kun totala valoro de 2,500,000 juanoj estis elsavitaj. En la tago de la akcidento, la produktado iris kiel kutime kaj la kvanto kaj kvalito de la produktaĵoj ne estis influitaj.

Pri la zorgo de kamarado Chen Yi al la Esperanta laboro

EN la lasta tagdeko de julio, 1963, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis en Beijing (Pekino) Ekspozicion pri la Esperanta Laboro de Ĉinio kaj samtempe ankaŭ Esperantan Labor-kunvenon.

Malgraŭ okupiteco, kamarado Chen Yi (1901-1972), kiu tiam funkciis kiel vicĉefministro kaj ministro de Eksteraj Aferoj, vizitis nian ekspozicion laŭ invito. Dum sia rigardado al la ekspoziciaĵoj, li montris sin tre afabla kaj atente aŭskultis kla-

rigojn de respondeculoj de ĈEL. Informiĝinte pri la opinioj de legantoj pri nia lando kaj proponoj por plibonigi nian Esp-gazeton, li diris kapjesante: "Bone! Bone! Tre bone vi laboris!" Ni prezentis al li eksterlandajn esperantaĵojn. Li miris, ke la Esperantaj tradukaĵoj de iuj klasikaj verkoj eldonitaj eksterlande atingis la nivelon de la originaloj. Li diris: "Mi vere ne atendis, ke Esperanto estas tiel esprimriĉa!" Kiam ni informis al li, ke ni sendis la Esperantajn tradukaĵojn de "Noveloj

de Lusin" al famaj eksterlandaj esperantistoj-verkistoj por peti iliajn opiniojn, li esprimis sian aprobon al tia faro.

La 25-an de julio, inaŭguriĝis la Esperanta Labor-kunveno. Kamarado Chen Yi ĝin ĉeestis kaj faris paroladon. Menciante pri sia vizito al la Esperanta ekspozicio, li diris: "Ĝi iom plimultigis miajn sciojn kaj plivastigis mian vidkampon." Li proponis, ke la ekspozicio estu montrata en aliaj urboj, por ke ankaŭ alilokaj kamaradoj, same



Vicĉefministro Chen Yi vizitas la Ekspozicion de la Tutlanda Esperanta Laboro.


kiel li, povu iom plimultigi siajn sciojn kaj plivastigi sian vidkampon.

Li esprimis sian aprobon al la atingoj de la Esperanta laboro en la pasintaj jaroj, dirante: “Mi admiras la Esperantan laboron. Tiu ĉi laboro estas neignorebla, nepre farenda kaj multe disvolvenda.” Li proponis, ke oni fondu Esperantajn rondojn en la grandaj urboj.

Kamarado Chen Yi ne konsentis pri la kritiko de iuj, ke la Esperanto-movado estas reformisma. Li diris: “La Esperanta laboro estas signifoplena por elimini rasajn kaj religiajn antaŭjuĝojn.” “Ni ne oponas kontraŭ ĉiaj reformoj, nur kontraŭ la reformo, ke oni servu al la imperiistoj, kondiĉe ke la lastaj donu favoron. La burĝa reformismo estas trompa kaj nuligas la revolucion, tial ni oponas kontraŭ ĝi. Sed revoluciaj reformoj povas altigi la politikan konscion de la popolamasoj.” “Mi ne aprobas maldekstreman frazadon.”

Kaj kamarado Chen Yi tre zorgis pri la revuo *El Popola Ĉinio*. Li proponis, ke ni aperigu en ĝi pli multe da interesaj legaĵoj kiel poemoj, eseoj, raportoj pri la ĉiutaga vivo, novaj aferoj kaj sciencaj scioj, por ke la legantoj trovi ĝin interesa. En 1967, la dumonata gazeto *El Popola Ĉinio* fariĝis monata pro lia varma zorgo kaj aktiva subteno.

Menciante pri la Universala Kongreso de Esperanto, kamarado Chen Yi diris, ke oni povas okazigi UK en Beijing, kaj por tio ni devas solide fari Esperantan laboron konforman al la kongreso. Kiam diverslandaj esperantistoj vizitos aliajn ĉi-



Vicĉefministro Chen Yi (maldekstre ĉe la longa tablo) en la Tutlanda Esperanta Labor-kunsido

najn urbojn, ili vidos ne nur la konstruadon de Ĉinio, sed ankaŭ nian Esperantan laboron.


Kamarado Chen Yi diris, ke por fari Esperantan laboron ni devas havi nombron da elitaj fakuloj, kiuj bone scipovas kaj Esperanton kaj la ĉinan lingvon.

Kaj krome, li diris ankaŭ, ke ni kontribuos al la popolo se ni solide laboros kaj rikoltos fruktojn. Li postulis ke ni zorge elkulturu nombron da junaj esperantistoj por heredigi Esperanton de generacio al generacio.

Liaj vortoj forte nin kuraĝigis. Por efektiviĝi lian deziron, en vintro de 1963 la Ĉina Esperanto-Ligo fondis, kun konsento de la Eduka Ministerio, Esperantan kurson en la Ĉina Popola Universitato por kulturaj E-instruistoj, kaj fininte sian lernadon, ili funkciigis oficialajn E-kursojn en 11 altaj lernejoj de la tuta lando. En aŭtuno de 1964, nombro da studentoj estis elektita el fremdlingvaj fakultatoj de

diverslokaj altaj lernejoj, por ke ili lernu en E-kurso en la Beijing-a Brodkasta Instituto. Tiam ni pensis, ke favoran situacion ekhavas la ĉina Esperanto-movado. Sed neatendite, post la eksplodo de la kultura revolucio en 1966, la kvarpersona bando malordigis edukan laboron en la lernejoj, kaj la instruado de Esperanto en la 11 altaj lernejoj estis ĉesigita. Hodiaŭ, rememorante la varman zorgon de kamarado Chen Yi pri nia Esperanta laboro, ni ne povas ne senti grandan bedaŭron pro neefektiveco de lia deziro!

Post 16 jaroj ni okazigis, somere de 1979, la duan tutlandan Esperantan Labor-kunvenon. En la kunveno ni diskutis pri laboro de disvolvo de Esperanto. Ni nepre ne vanigos la esperon de la proletaj revoluciistoj de la malnova generacio kiel kamarado Chen Yi al nia Esperanta laboro kaj iom post iom disvolvos kaj plivigliĝos la Esperanto-movadon en Ĉinio.



Liu Shaoqi

ANTAŬ nelonge okazis en Beijing (Pekino) la Kvina Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu plene renversis la maljustan verdikton pri kamarado Liu Shaoqi (Liu Ŝaŭki), kiu estis faligita en la kultura revolucio, kaj restarigis lian reputacion. Tio estas grava afero en la politika vivo de Ĉinio.

Liu Shaoqi estis vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko. Frue en 1920, kiam li estis 22-jara, li partoprenis en la revolucio. Dum la pasintaj dekoj da jaroj li dediĉis sian tutan energion al la ĉina revolucia afero kaj faris neforviŝeblajn kontribuojn por la nov-demokratia revolucio kaj socialismaj revolucio kaj konstruado de Ĉinio. Sed en la kultura revolucio li estis faligita kiel “renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo”.

En la meza periodo de la 60-aj jaroj, t. e. en la frua periodo de la kultura revolucio, pro malobjektiva taksado de la enpartia kaj enlanda situacioj, estis

Restarigo de reputacio de k-do Liu Shaoqi

farita erara konkludo, ke en la Partio ekzistas kontraŭrevolucia reviziisma linio kaj burĝa komandejo kun Liu Shaoqi kiel la ĉefo, kaj samtempe estis aplikitaj eraraj metodoj de batalo. Profitante tiun eraron, Lin Biao (Lin Biaŭ), la kvarpersona bando kaj similaj, kun la celo uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, intence faris politikan kaj fizikan persekutadon al kamarado Liu Shaoqi kaj faligis grandan nombron da gvidantaj kadroj de la Partio, registaro kaj armeo, kulpigante ilin kiel “agentojn de Liu Shaoqi en diversaj frontoj”. Tio kaŭzis ekstreme seriozajn damaĝojn al la vivo de la Partio kaj la ŝtato.

Post frakaso de la kvarpersona bando, la Centra Komitato de KPĈ likvidis la kontraŭrevoluciajn krimojn de Lin Biao kaj la damninda bando, kritikis la seriozajn erarojn de la kultura revolucio kaj, laŭ la instruo de Prezidanto Mao Zedong “respekti faktojn” kaj “korekti ĉiujn erarojn”, korektis multajn erarajn kaj maljustajn verdiktojn kreitajn de Lin Biao kaj la kvarpersona bando kaj i. a. restarigis reputacion de Peng Zhen (Peng Ĝen), eksurbestro de Beijing, Bo Yibo (Bo Jibo),

eksvicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj Lu Dingyi (Lu Dingji), eksestro de la Propaganda Departamento de la Centra Komitato de KPĈ. Dum tiu tempo la maljusta verdikto pri kamarado Liu Shaoqi fariĝis problemo tre atentata de la vastaj amasoj en kaj ekster la Partio. En la pasinta unu jaro la Centra Disciplin-kontrola Komisiono faris plenumpleksan enketadon pri la problemo de Liu Shaoqi kaj ripetadan kontroladon de la materialoj kaj prezentis ekzaktan kaj detalan raporton pri reekzameno de la kazo.

La granda kvanto da atestantoj, historiaj arkivoj kaj notoj en pasintaj jurnalaj kaj gazetoj pruvis, ke ĉiuj kulpigoj pri “renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo” altruditaj de Lin Biao kaj la kvarpersona bando al kamarado Liu Shaoqi en la Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio en 1968 estis kalumnioj malnoble faritaj de ili per falsaj materialoj.

En la Kvina Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato 319 membroj kaj alternaj membroj de la Centra Komitato faris seriozan diskutadon, unuanime aprobis la rezolucion pri ren-

Kamarado Liu Shaoqi kaj infanoj (1959)



verso de la maljusta verdikto pri kamarado Liu Shaoqi, decidis nuligi la kulpigojn altruditajn al li de la Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio kaj ĝian eraran rezolucion "por ĉiam eksigi lin el la

Partio kaj senigi lin je ĉiuj liaj oficoj en- kaj ekster-partiaj", restarigi reputacion de kamarado Liu Shaoqi kiel granda marksisto, proleta revoluciisto kaj unu el la ĉefaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato kaj okazigi


funebran kunvenon por li.

La decido pri renverso de la verdikto pri kamarado Liu Shaoqi ricevis varman aprobon de la tuta Partio, tuta armeo kaj diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando. La decido mem montris, ke la Komunista Partio de Ĉinio estas marksisma revolucia partio, kiu estas honesta, respektas faktojn kaj kuraĝas malkaŝe konfesi kaj korekti siajn erarojn.

Restarigo de reputacio de kamarado Liu Shaoqi estas ne nur por Liu Shaoqi mem, sed ankaŭ por tio, ke la tuta Partio kaj tuta popolo ĉiam memoru tiun seriozan lecionon kaj faru ĉiajn penojn por defendi kaj perfektigi la socialismajn demokration kaj leĝojn de sia lando, kaj ke niaj Partio kaj ŝtato marŝu antaŭen senhalte en korektado de siaj mankoj kaj eraroj.

En 1963, kamarado Liu Shaoqi vizitis Kamboĝon kaj estis varme bonvenigata de la kamboĝa popolo.







▲ Kamarado Liu Shaoqi kaj gestudentoj en la unua de januaro de 1964

Kamarado Liu Shaoqi inspektis la Qinghe-an Drapofabrikon de Beijing, 1951


Kamarado Liu Shaoqi vizitis kamparanan familion en 1961.

Kamarado Liu Shaoqi inspektis en la Interna Mongolio, 1961.






Kamarado Liu Shaoqi
interparolis kun pasa-
ĝeroj en vagono, 1958.



Kamarado Liu Shaoqi
partoprenis en riparado
de konstruaĵoj en
Zhongnanhai, 1951.



Pinoj

Foto de WU FUQIANG kaj LI CHUNGENG

MILORAD DJURDJEVIĆ:

Tutkora gratulo

Kara REDAKCIO, karaj amikoj!

Okaze de la 30-a datreveno de la fondiĝo de NIA kara EL POLA ĈINIO, tutkore mi gratulas al vi la JUBILEON kaj samtempe deziras, ke neniŭ baro rompu vian marŝadon sur la nobla vojo de homara feliĉo.

Kompare kun homa vivo, 30 jaroj estas relative longa tempo, pli longa se la homo malfacile vivas, sed por nacia historio 30 jaroj ne estas longa tempo kaj povas signifi, interalie, viglan kaj sukcesan tempon en iu direkto aŭ inverse.

Via lando povas esti fiera kun atingoj dum la tri lastaj jardekoj, ĉar vi per propraj fortoj estis devigitaj rekonstrui vian ĝis tiam martiran landon kaj krei novan socion. Tion vi faris sukcese sen helpo de "amikoj". Ni jugoslavo komprenas kiom da suferoj vi havis dum tiu periodo, ĉar la historioj de niaj landoj similas. Ankaŭ vi, kreintoj kaj laboristoj de EPĈ, meritas apartan laŭdon, ĉar vi samtempe kun la rekonstruado evoluigadis rimedon por la monda paco kaj interkompreno.

Vian marŝadon sur la nobla vojo mi akompanis nur lastan trionon de la tempo kiel infanoj post la marŝantaj soldatoj, penante marŝi kun vi firme kaj konkorde. Kiom mi sukcesis, vi scias. Ho, kiel bone mi memoras marton de 1971 kiam mi unuan fojon, kiel nova esperantisto, ekvidis lastajn du numerojn de EPĈ el 1970. Vi ne povas imagi kiel fiera mi estis, vidinte ke tiom granda lando, pri kies naciliberiga batalo mi sufiĉe sciis, okupas sin pri lingvo kies nobla ideo eniris firme en mian koron. Mi havis feliĉon ricevi unu el la ekzempleroj kiun mi montradis al ĉiuj, kiel pruvo ke Esperanto venkos. Nun mi ricevas ses ekzemplerojn de EPĈ. Post apero de ĉiuj 12 n-roj, mi kompletigas jarkolekton kaj tri kompletojn mi donacas al tri elementaj lernejoj kaj aliajn mi konservas por societa biblioteko, kiun ni havos post ricevo de la societejo. Ni esperas, ke tio okazos ĉijare. Kiom ni Smederevanoj kaj aliaj jugoslavo estimas vian revuon, tion montras nia intereso kaj nombro da abonantoj.

Kion mi povas diri pri EPĈ? La okuloj estas la unuaj gustu-

mantoj kaj juĝistoj pri ĉio kion ili ekvidos. La unuaj impresoj preskaŭ ĉiam restas neŝanĝitaj. EPĈ jam per aspekto kaj ekipaĵo varbas ĉiun. Se temas pri enhavo, mi povas diri jene: se ĝuanto de EPĈ estas komencanto aŭ infano, belaj koloraj bildoj kaj bildrakontoj varbas ilin. Se temas pri industri- aŭ agri-fakuloj, ili povas tre ofte trovi por si interesajn artikolojn kaj informojn.

Se ĝuantoj estas historiistoj, etnologoj, politikistoj, sportistoj, aŭ kiuj ajn aliaj fakuloj, ankaŭ ili povas tre ofte ĝui enhavon.

Mia nura eta sugesto estas: enkonduku konstantan rubrikon "LA VERDA ANGULO" sur la certa aŭ certaj paĝoj de la revuo, kies enhavo estu E-movadaj novaĵoj el Ĉinio, E-historio en Ĉinio, novaj E-libroj, kontaktoj kun aliaj E-istoj ktp. Kompreneble estas, ke spaco de la Angulo neniam estas sama, sed ekzistu.

Kun amikaj salutoj kaj bondeziroj

Via jugoslava amiko
Milorad Djurdjević

Nova konstanta komitato de ĈEL



ĈEL-DELEGACIOJ AL INTERNACIAJ E-KONGRESOJ



Hujucz



Bakin



Ye Laishi (Jezezo)



Chen Yuan



Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen)



Li Naixi

EKDE 1979, la ĉina Esperanta movado havis novan disvolviĝon kaj pli multajn kontaktojn kun Esperantaj organizoj de aliaj landoj. Por adaptiĝi al tiu nova situacio, la Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĝia konstanta komitato estas pli-grandigitaj laŭ postulo de la Ĉina Esperanta Labor-kunveno en aŭgusto de 1979. La nova konstanta komitato konsistas el 15 personoj, el kiuj estis elektitaj prezidanto, vicprezidantoj, ĉefsekretario kaj vicĉefsekretario kiel jene:

Prezidanto: Hujucz, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko;

Vicprezidanto: Bakin, fama ĉina verkisto, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj unua vicprezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj;

Vicprezidanto: Ye Laishi (Jezezo), vicestro de la Komisiono por Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo;

Vicprezidanto: Chen Yuan, vicprezidanto de la Asocio de Ĉinaj Eldonistoj kaj direktoro kaj ĉefredaktoro de la Komerca Eldonejo;

Ĉefsekretario: Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen), ĉefredaktoro de El Popola Ĉinio;

Vicĉefsekretario: Li Naixi, antaŭa estro de la oficejo de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Ĉijare la Ĉina Esperanto-Ligo sendos siajn du delegaciojn al internaciaj kongresoj de Esperanto. Unu delegacio el 8 membroj kun fama verkisto Bakin, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kiel estro partoprenos en la 65-a Universala Kongreso en Stokholmo, Svedio. La alia el 3 membroj kun profesoro Xue Chengzhi, prezidanto de la Hubei Esperanta Asocio kaj dekanato de la fremdlingva fakultato de la Centra-Ĉinia Normala Instituto, kiel estro flugos al Vankuvero por ĉeesti la 2-an Pacifikan Kongreson de Esperanto laŭ invito de la Kanada Esperanto-Asocio.

PREPARO POR FONDO DE YUNNAN-A E-ASOCIO

Je la 9-a de februaro, ĉijare, fondiĝis la prepara grupo de la Yunnan (Junnan)-a Esperanto-Asocio en Kunming, ĉefurbo de la provinco. Veterana esperantisto Zhu Jiabi, respondeculo de la Yunnan-a Partia Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicprezidanto de la Yunnan-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, estis elektita kiel ĝia honora estro. Fang Zhongbo, respondeculo de la Yunnan-a Universitato, estis elektita kiel ĝia estro. Lu Wanmei, vicprezidanto de la Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj de la provinco, kaj Zhang Xiwen, estro de la Yunnan-opera Trupo, estis elektitaj kiel ĝiaj vicestroj. Antaŭ la fondiĝo de la prepara grupo, oni okazigis kunsidon pri la provinca Esperanta laboro. Kamarado Yan Zhen, vicestro de la Propaganda Departemento de la provinca partia komitato de KPĈ, faris paroladon en la kunsido.



Esperanta Traduka Ekzercado

TRADUKA ekzerco estas grava por lerno de fremda lingvo. Nature ankaŭ ĉiuj lernantoj de Esperanto faras tian ekzercon. Antaŭe traduka konkurso estis grava parto de la aktivecoj de la Belartaj Konkursoj organizitaj de UEA, kaj nur pro malfacileco de akiro de kompetentaj juĝantoj, tiu internacia aktivado sin limigis en la kadro de apartaj nacioj ekde 1975.

La ĉinaj esperantistoj ĉiam donas sufiĉe grandan atenton al traduka aktivado. En la monata gazeto "La Mondo" en la tridekaj jaroj kaj en la gazeto "Popola Mondo" en la kvindekaj jaroj estis aparta rubriko "Traduka Konkurso" kaj ankaŭ parto de la laborantoj de "El Popola Ĉinio" aranĝis kolektivian tradukan ekzercon en la komenca periodo de la sesdekaj jaroj. Tiuj aktivadoj multe helpis al la lernado de Esperanto.

En la lastaj jaroj, aktivado de Esperanta traduka ekzerco estis iniciatita de kamarado Tikos, por altigi la lingvan nivelon de novaj kaj malnovaj esperantistoj, konforme al la bezono de servado al nia moderniga konstruado. En junio de 1978, tia kolektiva

ekzerco estis komencita inter korespondantaj esperantistoj kaj ĝi okazis unufoje en ĉiu dua monato, sub zorgado de du volontuloj, nome k-do Hu Guozhu kiel resumanto de la rezultoj kaj k-do Mu Bing kiel organizanto.

La volontuloj dissendas al la partoprenantoj la tradukendajn tekstojn, tre diversajn enhance kaj forme, plejparte ĉerpitajn el gazetoj kaj ĵurnaloj, ekzemple la artikolon "Printempo de Sciencoj" de la fama verkisto kaj historiisto Guo Moruo, poemon de ĉefministro Zhou, paroladon de marŝalo Chen Yi pri Esperanto, raportaĵon de veterana verkisto Xu Chi, artikolon de matematikisto Hua Luogeng pri sia memlernado, historion pri la forpasinta veterana revoluciisto Xu Teli kaj rakonton pri la batala vivo de Verda Majo. La partoprenantoj de la ekzercado povas elekti por si konvenan pecon por traduko kaj post plenumo de la ekzerco sendi la tradukaĵon al Hu. Kaj ĉiu partoprenanto povas ricevi ekzempleron de Resumaĵo Bulteno, kiu donas sciojn pri la arto kaj teorio de tradukado kaj Esperanta gramatiko en ligo kun la demandoj aperintaj en la ekzercoj. Ofta vigla diskutado inter la tradu-

kintoj tre utilas al la lernado. Por helpi la komencantojn, en la Bulteno troviĝas ankaŭ aparta rubriko por ili, en kiu aperas modelaj legaĵoj kaj aliaj utilaj materialoj. Ĉiu resume de traduka ekzerco enhavas ĉ. dek mil ĉinajn ideografiaĵojn kaj la aperintaj dek resumoj enhavis cent mil ideografiaĵojn. Krome, la Bulteno publikigis liston de la partoprenintoj vicigitaj laŭ iliaj merititaj lokoj en la tradukaj ekzercoj.

Ĉar la partoprenantoj estas ne nur legantoj de la Bulteno, sed ankaŭ ĝiaj kunlaborantoj, ili ĉiuj ĝin prizorgas. Kaj tiu aktivado estas limigita nek tempe nek loke, tial ĉiam pli multiĝis la partoprenantoj eĉ sen aparta propagando — en la komenco estis nur 17 partoprenantoj, dum nun jam pli ol 80, en 22 provincoj kaj urboj. Inter ili troviĝas maljunuloj kun aĝo de pli ol 80 jaroj kaj junuloj apenaŭ 20-jaraj, kaj ankaŭ nemalmultaj virinoj. Ili ĉiuj amas Esperanton kaj estas seriozaj kaj diligentaj en sia lernado.

Kaj tiu aktivado de traduka ekzerco estas disvolviĝanta en nia lando.

(G.M.)



Rememoro pri kamarado Xu Ziqi

de QIU JI

JE la 20-a de januaro, 1980, forpasis en malsano kamarado Xu Ziqi, membro de la Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, en sia aĝo de 73 jaroj.

Kamarado Xu Ziqi estis revoluciulo kaj esperantisto. Jam en 1927 li komencis okupiĝi pri revoluciaj aktivecoj. En la tempo de 1934-1935 li okupis sin pri la latinigo de skribo de la hana ideografio en Beijing kaj komencis lerni Esperanton.

Printempe de 1937, mi konatiĝis kun kamarado Xu Ziqi. Tiam ni ambaŭ vivis en Tajlando kaj li instruis en la lernejo Xinmin. Poste li fariĝis membro de la Tajlanda Esperanta Asocio kaj unu el la gvidantoj de la



Xu Ziqi

Kontraŭjapana Nacisava kaj Kontakta Federacio de la Ĉinaj Elmigrintoj en Tajlando. En tiu tempo li fondis Esperantan kurson en la lernejo kaj elkulturis nombron da patriotaj

esperantistoj. En 1938 li laboris kiel redaktoro de la tagjurnalo Zhongyuan en Bankoko, profitante oportunecon de sia ofico, li aktive faris propagandon pri rezisto kontraŭ Japanio.

Post la Dua Mondmilito kamarado Xu Ziqi venis al Xianggang (Hongkong) kaj fondis tie la Nanyang-an Komercan Bankon kaj fariĝis ĝia direktoro. Li faris multajn laborojn laŭ sia kapablo por subteni la sanktan Kontraŭjapanan Rezistmiliton de la patrolando kaj la Liberigan Militon por renversi la Kuomintangan regadon. En 1964 li revenis al Beijing kaj laboris kiel konsilisto de la Ĉina Banko. Kamarado Xu estis sincera, justama kaj diligenta en lernado. Li dekomence prizorgis kaj subtenis la Esperantan movadon, kvankam li estis tre okupita. Li ofte diris, ke laŭ evoluo de la socio, la homaro devas havi komunan internacian lingvon, kaj tiu ekzistas jam delonge kaj estas nomata Esperanto. Ni esperis, ke li povos fari pli grandan kontribuon al nia Esperanta movado. Estas bedaŭrinde, ke li forlasis nin por ĉiam. Sed liaj revolucia spirito kaj laborfervoro nin instigos por eterne.

(Daŭrigo de p. 3)

madon kaj fuĝon de geknaboj, la edukejo havas prizorgantojn. Ili ne praktikas korpan punon al la geknaboj, kaj anstataŭ tio ili faras pacienca edukadon.

Iam en iu geknaba edukejo de Beijing estis knabino Yao Fengying. Ŝi krimis foje kaj refoje malgraŭ edukado. Multaj opiniis, ke ŝi estas needukebla. Ŝi

mem perdis memfidon ĉu ŝi povos korekti siajn erarojn. Ŝi konsideris sin malestimata kaj perdis fidon al la vivo. Foje ŝi ŝtele forkuris el la edukejo. Sed post kelkaj tagoj ŝi revenis al la edukejo. La prizorgantoj ne riproĉis ŝin, male, laŭdis ŝin, ke ŝia reveno montris ŝian decidon sin korekti. Tio estis tute neatendita de ŝi kaj emociis ŝin ĝis larmoj. Post edukado ŝi

revenis hejmen. Ŝi kaj la prizorgantoj fariĝis bonaj amikoj kaj ŝi rigardis ilin kiel siajn familianojn. Sub la helpo de la prizorgantoj ŝi fariĝis amatino de iu honesta junulo. Ili fariĝis feliĉaj geedzoj kaj ŝi nun estas laboristino de ŝpinteksejo. Plejparto de la gejunuloj revenintaj de tiaj geknabaj edukejoj fariĝis bonaj homoj kaj nur tre malmultaj el ili rekrimis.

La perspektivo de la monda ekonomio en la okdekaj jaroj

—Opinioj de ĉinaj ekonomikistoj pri la monda ekonomio

ANTAŭ nelonge, la redakcio de "Monda Ekonomio"* invitis ekonomikistojn al kunsido, en kiu la specialistoj esprimis siajn opiniojn pri la tendencoj de la disvolviĝo de la monda ekonomio en la okdekaj jaroj. Iliaj paroloj tuŝis problemojn pri tri flankoj.

LA ĈEFAJ TRAJTOJ KAJ TENDENCOJ DE LA MONDA EKONOMIO EN LA SEPDEKAJ JAROJ

Iuj specialistoj opiniis, ke post la Dua Mondmilito la disvolviĝo de la monda ekonomio estas dividebla en du etapojn. En pli ol 20 jaroj antaŭ 1973, la ekonomio de la kapitalismaj landoj disvolviĝis relative rapide. En tiu periodo la nombro de laborhavaj personoj multe kreskis, la procentaĵo de senlaboruloj en la tuta loĝantaro malgrandiĝis, la prezoj leviĝis kompare malrapide, la valutoj estis relative stabilaj. La kapitalo ne nur pli grandigis enlande, sed ankaŭ rapide etendiĝis eksterlanden. Depost 1973, la monda ekonomio deturniĝis de sia antaŭa vojo. La ekonomia kresko de la kapitalismaj landoj malrapidiĝis en ĉiuj flankoj, la procentaĵo de senlaboruloj en la tuta loĝantaro grandiĝis, la prezoj ŝveliĝis pli rapide kaj la valutoj ŝanĝiĝis tre ofte.

Kial tiuj ŝanĝiĝoj okazis al la ekonomio de kapitalismaj landoj? La ĉefaj kialoj estas jenaj: Unue, la tria alta tajdo de sciencoj kaj teknikoj jam forpasis, kaj la teknika progreso malrapidiĝis okulfrape; due, forpasis la malkara kaj abunda provizo de petrolo, aperis krizo de energio kaj forte leviĝis la prezo de petrolo; trie, la neindustria tendenco de la ekonomio (industria laboruloj reduktiĝis relative aŭ absolute kaj servistoj pliiĝis evidente); kvare, la investado de fiksa kapitalo malrapidiĝis rimarkinde; kvine, protektismo reaparis en ekstera komerco.

Iuj el la kunsidantoj opiniis, ke post la Dua Mondmilito ĉiam ekzistas stagneco de la usona ekonomio, kiu jam komenciĝis en la tridekaj jaroj. La scienca kaj teknika revolucio kaj serio da rimedoj de ŝtatmonopola kapitalismo ne povis radikale ŝanĝi tiun tendencon.

La ĉeestantoj montris ankaŭ, ke la ekonomio de Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj en la sepdekaj jaroj renkontis malfacilojn kaj la progreso malrapidiĝis. Kvankam la ekonomia pliiĝo de la disvolviĝantaj landoj de la tria mondo estis pli rapida ol tiu de la disvolvitaj landoj, tamen ilia disvolviĝo estis tre malekvilibra kaj ankaŭ ili ren-

kontis nemalmultajn malfacilojn.

LA PROBLEMOJ ALFRONTOTAJ DE LA MONDA EKONOMIO EN LA OKDEKAJ JAROJ KAJ ĜIA PERSPEKTIVO

La kunvenantoj opiniis, ke tiuj faktoroj, kiuj estigis ŝanĝiĝojn al la monda ekonomio en la sepdekaj jaroj, plue ekzistos en la okdekaj jaroj, kaj eĉ plifortiĝos. La kapitalisma ekonomio en la okdekaj jaroj estos ankoraŭ en nestabileco kaj seriozaj malfaciloj, la ekonomio de la kapitalismaj landoj, inkluzive tiun de Usono, ankoraŭ stagnados kaj malrapide disvolviĝos sur la kruta vojo de altaj prezoj, alta procentaĵo de senlaboreco kaj malalta ekonomia pliiĝo, kaj ĝi ne povos multe pliboniĝi. Iuj montris, ke en la okdekaj jaroj eble aperos perioda krizo de monda ekonomio. Sed la kunvenantoj opiniis, ke laŭ diversaj konataj faktoroj, ne okazos en la okdekaj jaroj tiel granda krizo, kiel tiu en la jaroj 1929-1933.

La specialistoj opiniis, ke en la okdekaj jaroj, Sovetunio alfrontos serion da malfaciloj, kiaj nesufiĉa provizado de petrolo kaj manko de laborfortoj, kaj ĝia ekonomia pliiĝo malrapide-

diĝos plue. Sed ili opiniis, ke la rapideco de la ekonomia disvolviĝo de Sovetunio ankoraŭ superos tiun de Usono kaj la neegaleco inter la ekonomiaj fortoj de Usono kaj Sovetunio malgrandiĝos plue. La diversaj landoj de la tria mondo havos perspektivojn tre malsamajn. La landoj produktantaj petrolon aŭ metalajn materialojn aŭ prilaborantaj materialon estas en relative bona ekonomia stato, sed ĉiu el ili havos siajn malfacilojn. La aliaj disvolviĝantaj landoj estos trafitaj je duobla frapo de prezo-altiĝo de petrolo kaj industriaj produktaĵoj, ankaŭ la prefortoj de la ŝuldoj fariĝos pli grandaj, la prezoj de krudaj materialoj malaltiĝos kaj la produktita greno ne povos kovri la bezonon de la loĝantoj. Ĉio ĉi akompanos politikan nestabilecon kaj la malfaciloj estos tre seriozaj.

La parolantoj en la kunsido montris emfaze, ke energio kaj milito estos du aparte atentindaj problemoj en la okdekaj jaroj. La problemo de energio en tiu periodo fariĝos pli akra kaj pli forte influos la ekonomian disvolviĝon de diversaj landoj, kaj la batalo por energiaj kaj materialaj riĉfontoj fariĝos pli intensa. Tio nature pligrandigos la eblecon de eksplodigo de milito. Ili opiniis, ke en la okdekaj jaroj la kondiĉoj por tria mondmilito estos ankoraŭ ne tute formitaj, sed regionaj militoj okazos de tempo al tempo.

LA PERSPEKTIVO DE LA MONDA EKONOMIO KAJ LA MODERNIGA KONSTRUADO DE ĈINIO

La kunsidantoj montris: En la okdekaj jaroj, dum kiuj la monda ekonomio alfrontos diversajn malfacilojn, la disvol-

viĝo de moderniga konstruado de Ĉinio estos nepre atentata kaj zorgata de multaj landoj. La ekonomiaj kontaktoj de Ĉinio kun aliaj landoj multiĝos, pli multe da eksterlandaj kapitalo, ekipaĵoj kaj avangardaj teknikoj estos enkondukitaj, kaj samtempe Ĉinio bezonos eksporti pli multe da varoj. La subtera petrola

fonto de Ĉinio altiras atenton de multaj landoj kaj Ĉinio kun miliarda loĝantaro estas merkato kun granda latentă aĉetpovo. Ĉinio bezonas la mondan merkaton kaj aliaj landoj la ĉinan.

* "Monda Ekonomio", monata gazeto redaktata kaj eldonata de la Ĉina Ekonomika Instituto



* D-ro TORTEL, FFA 62600, BERCK FRANCIIO, dez. interŝanĝi kun medicinistoj, flegistinoj, akuŝistinoj, ktp pri profesiaj informoj.

* S-ro JEANMART WILLY, 32-j., route d'Eghezée, 8, B-5850 Bovesse, Belgio, kun ĉina fraŭlino (18-25-j) pri vivmanieroj, religioj, filozofioj.

* Rachel M. Dhonau, 9 Cromer Road, Sheringham, Norfolk, Nr26 8RS, Anglio, kun ĉinaj geesperantistoj.

* Zoran Avramovic, 21-j., Vase Pelagica 4, Smederevo 11.300 Jugoslavio, kun ĉinaj gejunuloj.

* Dmytro Sawkewycz, 82-j., kanada ukrainano, P. O. Box 128, Grimsby, Ontario, Kanado (Canada), pri naciaj aferoj.

* Sandro Venturini, Viale Kennedy 39, 30037 Scorze (VE), Italio, ĵurnalisto, skribonta libron pri "Botaniko por Sano", kun spertuloj de la tuta mondo, kaj interŝanĝi informojn utilajn reciproke.

* S-ro Tore Johansson, 62-j., Silkeborgsgat FC, S-39243 Kalmar, Svedio, kun ĉinaj geesperantistoj pri ĉiuj temoj.

* Esp. klubo "Verda Stelo", kun ĉinaj geesperantistoj, adr.: S-ro

Fiume Domenico, Via S. Francesco n. 86-D, 89051 Archi-Reggio Cal., Italio.

* Anne Ambles, 18-j., 11 Rue des Ducs, 55000 Bar-Le-Duc, Francio, studentino, kun juna ĉina esperantist(in)o por ekkonatiĝi kun Ĉinio.

* Kazimierz Dolega, 40-j. instruisto, 19-300 Elk, ul. Slowackiego 14/36, Pollando, kun ĉinaj esperantistoj.

* F-ino Joyce Turner, 51-j. instruistino kaj bibliotekistino en elementa lernejo, 19 Wandal Road, Rockhampton 4700, Aŭstralio, kun plumamiko en Ĉinio.


* Esp. klubo "Frateco-Unueco" Gimnazio, 36300 Novi Pazar, Jugoslavio, kun tutmondaj gejunuloj kaj petas ĉiujn Esp. klubojn sendi esperantlingvajn librojn, afiŝojn, gazetojn, desegnojn, ktp.

* Bob Intek, Apartado 940, Las Palmas GC, Hispanio, kun ĉinaj geesperantistoj kaj kolektantoj el aliaj landoj. Kolektas malnovajn monbiletojn, monerojn kaj poŝtmarkojn. Rekompenco laŭ via volo.

* Vanda Klopčič, 17-j., Askerceva 44, 61230 Domzale, Jugoslavio, kun junaj geesperantistoj en Ĉinio.

* S-ro Kurt Niederbroker, Bindingstrabe 9 D-4980 Bunde, FR. Germanio, kun ĉina esperantistino.

* Csallo Istvan, 23-j. geodeta teknikisto, Esztergom, Beke ter 37/c, 2500 Hungario, kun ĉina esperantisto pri ĉiuj temoj.



Laborejo de aer-blova ŝpinado

WEN TIANSHEN:

Teknika reformado de la tekstila industrio de Shanghai

LASTATEMPE mi vizitis la plej grandan tekstilan bazlokon de Ĉinio — Shanghai. Ĉiumonate la tieaj majstroj projektas mil specojn da kolore presitaj ŝtofoj.

I

En la Shanghai-a Industria Ekspozicio mi vidis multajn novajn diverskolorajn teksaĵojn. Inter ili troviĝas aparte presita teksaĵo, mildkolora mola lanvesto, acid-presita poliestera-kotona teksaĵo maldika kiel flugila membrano de cikado, klardesegne kaj brilkolore presita tafto, vermoresista drapo,

kontraŭfajrera poliestera-kotona teksaĵo k.a.

En interparolado kun kamaradoj de la Shanghai-a Tekstila Buroo, nia paroltemo nature transiris al la ŝanĝiĝo de la tekstila industrio de la urbo.

Nun, en la urbo estas 460 fabrikoj de kotona kaj lana tekstilado, trikado kaj tinkturado. La produktokvanto de kotonaj ŝpinajoj kaj ŝtofoj kreskis je 1.5-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo de la nova Ĉinio, tamen el la tekstilaj ekipaĵoj de la urbo en la pasintaj 30 jaroj malpliigis 500,000 spindeloj kaj 10,000 teksiloj. La

sekreto de pliprodukto kuŝas en tio, ke teknikistoj kaj laboristoj senĉese faris al la ekipaĵoj teknikan reformadon.

La teksejoj anstataŭigis malnov-tipajn spindelojn per altrapidaj. La rapideco de turniĝo de spindeloj altiĝis de 8,000 al 18,000 rivoluoj en ĉiu minuto, kaj iuj tekslaborejoj instalas por si aer-elŝprucigajn teksilojn, tial la produktivo de ĉiu maŝino kreskis je 30%. 50% de la teksaĵoj de la urbo estas alt- kaj mez-klasaj ŝtofoj kiuj karakteriziĝas per delikateco, kompakteco, larĝeco kaj nova tipo. La urbo produktas ŝtofojn kotonan, lanan kaj sintez-fibran.

De la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝis nun, nia lando investis 700 milionojn da janoj por la tekstila konstruado de Shanghai, tamen la profito kaj imposto donitaj de la tekstila industrio al la ŝtato egalas al 66-oblo de la investita sumo.

II

Unue mi venis al la Shanghai-a Dudekdua Tekstila Fabriko kun historio de cent jaroj. Antaŭ la Liberiĝo ĝi estis unu el la plej grandaj tekstilejoj de nia lando. Tiam la produktado disvolviĝis tre malrapide. Dank' al teknika reformado la fabriko senĉese altigis sian produktopovon kaj ĉiujare pliproduktas teksaĵojn je 5%. En 1979 ĝi estis honorita per titolo "Fabriko kun Fidinda Kvalito".

Mi vizitis la antaŭŝpinan laborejon. Ĝi havas vandon kiu dividas ĝin en du partojn, en la unua estas bruoplenaj kardmaŝinoj kaj en la dua senbruaj maŝinoj de aer-blova ŝpinado

kun polvosuĉiloj. La blankaj kotonfaskoj estas ensuĉitaj de aerfluo en rotorojn. Mi ankaŭ rigardis aer-blovan rub-apartigilon sukcese provfabrikitan de la fabriko kaj iu scienc-esplora institucio. Ĝi estas grava parto de la maŝino de aer-blova ŝpinado de la ĉina dua generacio. Tia novtipa maŝino estas instalata kaj baldaŭ ludos apartan rolon.

La dua fabriko kiun mi vizitis estis la Shanghai-a Dekoka Lanŝpinejo. Ĝi ĉiutage produktas 10 tunojn da lanfadenoj. Gvidate de fabrikestro Chen Songhe, mi rigardis diversspecajn kolorajn lanfadenojn, ekz. fade- nojn miksitajn kun oraj aŭ arĝentaj fibroj. Li diris, ke tiuj ŝpinaĵoj estas produktitaj per maŝinoj kaj tinkturoj faritaj de nia lando.

Dum vizitado al la fabriko mi aŭdis jenan rakonton: Antaŭ nelonge alvenis tekstila specialisto de FRG. Li volis vidi, per kiaj maŝinoj ĉinoj produktas tiel molajn lanteksaĵojn. Kiam li

venis al ŝpinilo kun minuta rapideco de 10,600 revoluoj kaj rimarkis la neklarajn vortojn sur la maŝino "Farita de Britio, 1896", li ne kredis siajn okulojn. Ĝi estis malnova maŝino importita el Britio antaŭ la Liberiĝo. La nuna maŝino tenas nur la originan ŝelon, sed novan internan strukturon, ĉar laboristoj faris al ĝi teknikan reformadon je 270 fojoj. Dank' al tio ĝi funkcias ne nur normale, sed ankaŭ produktas altklasajn ŝpinaĵojn. Tra la fenestro de la oficĉambro de la fabrikestro, mi vidis, ke en la korto iras intensa konstruado de moderna laborejo de akrila-fibraj litkovriloj. Ĝi kreos pli favoran perspektivon por disvolvi nian sintez-fibran aer-blovan ŝpinadon.

III

En la sesdekaj jaroj, la poliestera kaj mezlonga-fibra teksaĵoj estis ankoraŭ fremdaj por multaj personoj. Nun, nur la Shanghai-aj koncernaj fabrikoj

Teksistinoj Sun Xueqin (la dekstra) kaj Shang Guizhen teksis respektive dekmil metrojn kaj sescent dek mil metrojn da bonkvalitaj ŝtofoj.



jam produktas jare 300 milionojn da metroj da supre menciitaj ŝtofoj.

En la Hongguang-a Ĉemiza Fabriko de Shanghai troviĝas originala produkta linio por produkti ĉemizojn el poliesteraj teksaĵoj. Laboristoj plene utiligis la spacon de la laborejo kaj instalis du maŝinojn unu super la alia. Por akiri sufiĉan spacon por instalati la ĉefan akson de maŝino ili faris truon en la muro. Per tiuj ekipaĵoj la fabriko produktas diverskolorajn belajn poliesterajn kaj mezlonga-fibrajn vestojn.

Shanghai nun posedas 400 specialajn tekstilajn ekipaĵojn projektitajn kaj faritajn de tekstilejoj kaj pres-tinkturejoj. En la sama jaro, post kiam la novaj ekipaĵoj ekfunkcias normale, la fabriko donis al la ŝtato profiton egalan al la tuta investita sumo por tio. Iu specialisto diris al mi: "Se oni konstruos unu fabrikon de poliesteraj teksaĵoj kun jara produktokvanto de cent

milionoj da metroj, tio signifas, ke Ĝi devas konstrui fabrikajn domojn kun plankareo de kvindek mil kvadrataj metroj kaj bezonos investon de tridek milionoj da juanoj, kaj nur post tri jaroj oni povos vidi la de ĝi kreitan profiton."

IV

En la vizitado mi trovis, ke la laborkondiĉoj de tekstilaj laboristoj de la urbo pliboniĝis ĝenerale. Oni ankoraŭ bone memoras, ke antaŭ la Liberiĝo la laboristoj devis transportadi 20-kilograman faskegon de dikaj fadenoj al alta breto de maŝinoj. Ĉiutage la ŝpinistinoj estis laciĝitaj de la peza laboro. Nun la ŝtato tute ŝanĝiĝis.

En la Shanghai-a Dekdua Tekstilejo mi iris laŭ la produktaj linioj interligitaj unu kun alia. Sur la transporta linio de dikaj fadenoj estas instalita televida ekipaĵo de direktado. En proksima estonteco realiĝos la idealo, ke oni teksos ne pied-

irante por superrigardi kaj ne uzante manojn por ligi la rompitajn fadenojn.

En la tekstilejo mi metis bruomildigajn orelŝtopilojn en miajn orelojn. Por la aplikantoj de tiaj iloj, la aŭdita bruo de 500 hercoj povas esti reduktita je 20 decibeloj. Nun la orelŝtopiloj estas aplikataj en parto de tekstilejoj kaj ilia kvalito proksimiĝas al tiu de tiaj iloj de aliaj landoj.

V

Oficisto de la Shanghai-a Tekstila Buroo diris, ke la kvalito de 28 ĉefaj specoj de teksaĵoj atingis internacian avangardan nivelon. La acid-presita poliestera-kotona teksaĵo produktita de la Shanghai-a Sepa Prestinkturejo estas fame konata en la internacia merkato pro sia simileco al brodaĵo. Nemalmultaj fabrikoj aplikas novan teknologion de diversspecaj spindeloj anstataŭ la tradician centjaran teknologion. Dank' al tio la pro-

Akrila-fibraĵa litkovriloj



Desegnado de silkaj kaptukoj





Pakado de poliesteraĵaj miksteksaĵoj

dukta proceso mallongiĝis multe kaj la hora produktokvanto de mil spindeloj leviĝis de 18 kg. al 47 kg. En iuj fabrikoj oni aplikas novajn teknikojn de elektrostatika ŝpinado kaj ŝpinado sen spindeloj.

Mi informiĝis ke oni reformis 12,000 teksilojn de 20 tipoj en aŭtomatajn, 260 en rapir-teksilojn kaj pli ol 1600 aŭtomatajn

teksilojn en aer-elŝprucigajn teksilojn. Kelkaj prestinkturejoj kunlabore faris specialajn ekipaĵojn kaj per tio multe faciligis presadon kaj tinkturadon de larĝaj poliesteraĵaj ŝtofoj, presadon de rotacia stencilo kaj produktadon de mezlongaj fibroj.

Iu respondeculo de la buroo diris: "Nun la urbo Shanghai havas 41 famajn spe-

cojn de ŝpinaĵoj kaj teksaĵoj, kiuj konsistigas 36% de tiuj de la tuta Ĉinio. 9 el ili gajnis orajn kaj arĝentajn medalojn de la ŝtato. Ĉiujare, la fremdlanda valuto gajnita de la urbo en eksportado de ŝpinaĵoj kaj teksaĵoj superas trionon de la tuta valuto akirita de Ĉinio en tiu branĉo. Tiu granda kontribuo estas fiero de la Shanghai-aj tekstilaj laboristoj."

Kunlaboru!

TRADUKO aŭ alimani-
eraĵoj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur, ke oni notu la fonton kaj sendu al ni 3 ekzemplerojn de la gazeto aŭ alia presaĵo, en kiu ĉerpajo aŭ

tradukajo el nia gazeto estas aperigita, kaj fotojn pri ekspozicioj en kiuj niaj eldonaĵoj estis montritaj. Per tio vi helpos ne nur nian gazeton, sed ankaŭ la Esperantomovadon en Ĉinio.

LA RED.



Harbin-a Postlabora Universitato de Laboristoj

ANTAŭ nelonge mi veturis al la urbo Harbin de Heilongjiang (Hejlonggiang)-provinco en nordorienta Ĉinio por viziti la nomitan universitaton. Kvankam ĝi ne havas domegojn, belan korton kaj laboratoriojn bone ekipitajn, tamen la studentoj tre amas ĝin.

INTERVJUO AL ĜIA VICREKTORO

La 54-jara vicrektoro de la postlabora universitato Xu Cheng funkcias ankaŭ kiel estro de la eduka fako de la Ĝenerala Sindikato de Harbin. Li diris al mi, ke tiu ĉi universitato fondiĝis en 1958. En la komenco tie estis nur du fakoj pri maŝinoj kaj kemiindustrio. Ĉiuj ĝiaj pli ol 200 lernantoj estis teknikaj laboristoj kaj ĉefaj fortoj en produktado. Kvankam ili havis certan praktikan sperton, tamen pro malalta klereco kaj manko de sistema scio pri sciencoj kaj teknikaj teorioj, ili renkontis multajn malfacilojn en sia produktado kaj teknika renovigado. Tial ili tre deziris viziti la postlaboran universitaton. Nun, en la universitato krom la du menciitaj fakoj, aldoniĝis aliaj kvar pri maŝinfarado, aŭtomata regado, petrolkemia industrio, industrio kaj civila inĝenierado. Kaj la nombro de ĝiaj studentoj atingis 7,020.

Vicrektoro Xu diris ankaŭ, ke la studentoj estis rekomenditaj de siaj fabrikoj kaj entreprenoj kaj elektitaj de la universitato post testado. La tempodaŭro de ilia lernado estas kvar jaroj, kaj ĉiusemajne ili lernas 18 horojn. Dum tiu tempo ili ricevas sian salajron kiel antaŭe.

EUŜA EKZAMENO POR DIPLOMITIĜO

Iutage mi ĉeestis, kiel observanto, la nomitan ekzamenon. Studento Xu Yongsheng, kiu ĵus finis la klarigon pri sia projekto de domo por fergisado, estis respondanta demandojn de la ekzamena komisiono pri strukturaj formoj, projekto de konstruaĵoj,

bazaj teorioj, fakaj scioj ktp. Ĉiujn demandojn Xu bone respondis.

La alia diplomitigonta studento projektis 9-etaĝan hotelan domegon. Lia projekto estas originala kaj lia plano bonega, kaj pro tio li estis laŭdata de instruistoj.

La du ekzamenaj komisionoj de la universitato konsistis el profesoroj, specialistoj kaj teknikistoj kaj estis estrataj respektive de ĉefinĝeniero de la Harbin-a Unua Instrumenta Fabriko kaj vicestro de la Harbin-a Inĝeniera Kolegio. Ili diris, ke tiuj diplomitigontaj studentoj ekvizitis la universitaton en 1976 kaj plejparto de ili tiam nur havis kie-

Post leciono





Proklamo de diplomitiĝa disertacio

recon de elementa mezlernejo. En tri jaroj ili plenumis 13-17 studobjektojn pri bazaj teorioj kaj fakaj scioj. Plenumante ĝeneralan postulon de sia studo ili kombinis la projektadon por diplomitiĝo kun produktado.

PROFESORO WU

Por koni la instruadon de la postlabora universitato, mi vizitis du lecionojn respektive pri fremda lingvo kaj pulsaj matematikaj cirkvitoj, kaj interparolis kun profesoro Wu Chunyuan. Li diris, ke plejparto de la instruistoj de la universitato laboras kumule. Li mem estas vicestro de la instrua sekcio de komputeroj de la Harbin-a Industria Universitato, kaj ankaŭ unu el la 204 kumulaj instruistoj de tiu ĉi universitato. En la pli ol 20 jaroj ili ekkulturis multajn junulojn, el kiuj nemalmultaj jam fariĝis inĝenieroj, fabrikestroj kaj teknikistoj.

Profesoro Wu Chunyuan instruis en la universitato jam pli

ol 5 jarojn kaj estas multe respektata de la studentoj pro sia konscienca laboro. Foje por helpi lernanton solvi matematikan problemon pri cirkvito li persone iris al pluraj bibliotekoj por kolekti koncernajn materialojn kaj detale klarigis ĝin al la lernanto. Por levi la kvaliton de instruado profesoro Wu kaj aliaj instruistoj elverŝis multan energion en plibonigo de instruaj materialoj kaj instruaj metodoj.

POST DIPLOMITIĜO

En la pasintaj pli ol 20 jaroj la studentoj de la nomita universitato sekvis la principon: de praktiko al teorio kaj de teorio al praktiko. Sun Zhi, laboranto de la 6-a labortaĉmento de la Harbin-a 1-a Konstrua Kompanio, havis antaŭe malaltan klerecon. Dank' al sia diligenta lernado en la universitato, li paŝon post paŝo mastris modernajn teknikojn de konstruado. Foje li estis taskita projekti framan

strukturon de televizia domo de Harbin kaj direkti la konstruadon. Li ĉiamaniere faris teknikajn renovigojn kaj kune kun aliaj kamaradoj aplikis avangardan konstruan metodon. Poste, la ŝtata konstrua komisiono disvastigis teknikon renovigitan de li en la tuta lando. Nun Sun Zhi jam estis promociita al inĝeniereco. Lernantino Li Yu'e, patrino de du infanoj, estis antaŭe frezistino. En la 4 jaroj de studado ŝi venkis multajn malfacilojn kaj sukcese diplomitiĝis. Ŝi fariĝis poste teknikistino.

Zhan Hongyou, unu el la unuaj diplomitoj de la universitato, estis bovisto antaŭ la Liberiĝo kaj fariĝis laboristo post la Liberiĝo. Li antaŭe sinsekve vizitis postlaborajn elementan lernejon, mezlernejon kaj universitaton. En 5 jaroj li plenumis studon de ĉiuj lernobjektoj por regula universitato, kaj fariĝis inĝeniero. En junio de 1973, li estis transpostenigita de Harbin al la Ĝenerala Petrolkemia Fabriko de Daqing-olekampo. En aŭtuno de 1976, la nomita fabriko urĝe bezonis ŝlosilan maŝinparton, 24-vojan valvon, por produkti poliesteron kaj asignis la taskon al Zhan Hongyou. En la komenco, li provfabrikis tian valvon, tamen ĝi malbone funkciis. Li reformis la teknologion kaj finfine elfaris valvon post 3-monata eksperimentado. Prova uzado de ĝi montris, ke ĝi estas egale bona en funkcio kaj strukturo kiel samspecaj produktaĵoj fremdlandaj. Nun, Zhan Hongyou funkcias kiel vicĉefmaŝinisto de la Ĝenerala Petrolkemia Fabriko kaj estis elektita kiel labormodelo de Heilongjiang-provinco.



CHAI ZHONGWEN:



Pejzaĝoj de Tibeto

LA Tibeta Altebenajo en sud-
Lokcidenta Ĉinio estas formita
el la montaroj Himalaya, Gang-
dise, Tanggula, Kunlun kaj
Hengduan. La altebenajo kun la
absoluta alteco de pli ol 4,000
metroj estas la plej alta altebe-
najo en la mondo, kaj tial oni
nomas ĝin "firsto de la mondo".
La vastega altebenajo havas
multajn pejzaĝojn nevideblajn en
aliaj lokoj.

LOKO DE GLACIO KAJ NEĜO

En la tibeta lingvo Himalaya
signifas "Lokon de Glacio kaj


Neĝo". Ĝi staras ĉe la suda rando
de Tibeto. Ĝia meznombrata alteco
estas 6,000 metroj. Inter la kon-
tinuaj nuboskrapantaj montpin-
toj iuj estas ĉarmaj kaj aliaj
danĝeraj, sed ĉiuj kovriĝas de
brilanta neĝo en la kvar sezonoj.
Tie fiere staras la 8848.13-metra
Qomolangma, la plej alta mont-
pinto en la mondo, simila al im-
pona piramido. De tre multaj
jarcentoj ĝi forte altiras la aten-
ton de homoj. En la jaro 1960
tri ĉinaj montogrimpistoj unua-
foje surgimpis la montpinton
Qomolangma laŭ ĝia norda dek-

livo. En 1975 naŭ ĉinaj monto-
grimpistoj ascendis ĝin. De la
60-aj jaroj la ĉina scienca esplora
grupo dufoje organizis plurfakajn
esplorojn pri Qomolangma-re-
giono kaj akiris multajn valo-
rajn sciencajn materialojn pri
altaj montoj.

RIVERO-PATRINO

La klara Yarlungzangbo-rivero
fontas el Himalaya, orienten
kuras en suda Tibeto kaj fluas
tra Hindio en la Bengalan Gol-
fon. Ĝi, la plej granda rivero sur
la firsto de la mondo, longas
1,787 kilometrojn en Tibeto. Ĝi
serpentas inter altaj krutaj mon-
toj. Iuj ĝiaj sekcioj estas tre mal-
larĝaj, la altaj montpintoj sur
ambaŭ bordoj staras kiel gigan-
taj ŝtonaj pordoj kaj tiel la pro-
fundaj kanjonoj montriĝas im-
ponaj kaj danĝeraj. La altaĵoj
kaj malaltaĵoj de la tero akre
deklivigas la riverujon. Unu el
ĝiaj sekcioj estas nur 7.8 kilome-
trojn longa, sed ĝia akvofalo
atingis 350 metrojn kaj la flura-
pido 16 metrojn en sekundo. Se
oni utiligos la potencajn akvaj
fortojn por hidroelektro, tio ri-
markinde akcelos la industrion
kaj agrikulturon de Tibeto.

Yarlungzangbo havas larĝajn
valojn, multajn branĉojn kaj li-
giĝas kun multaj lagoj. Ĝi
akvumas vastajn agrojn kaj
fekundajn paŝtejojn en la baseno.
Tiu loko estas ĉefa bazo de agri-
kulturo kaj brutobredado de
Tibeto. Multaj novaj industriaj
urboj kaj antikvaj kulturaj urboj
dissemiĝas sur la bordoj de la
rivero. La tibetanoj amas tiun
riveregon kaj nomas ĝin Rivero-
Patrino. Kaj ĝi vere meritas tiun
nomon.



Neĝa montaro

ĈIELA LAGO

Norde de la Tibeta Altebenajo troviĝas granda lago Namco. Ĝi longas 70 kilometrojn de la oriento ĝis la okcidento kaj larĝas 30 kilometrojn. Ĝi estas la plej alta lago en la mondo,

4,718 metrojn super la marnivelo.


Oni staras sur lagbordo kaj vidas la vastan ondetantan surfacon etendiĝantan malproksimen. Blankaj nuboj velas en la ĉielo. La tibetanoj donis al ĝi la

nomon Namco, kiu signifas "ĉielan lagon". Ili adoras ĝin kiel dian lagon. Antaŭe tre multaj tien pilgrimis en periodaj tagoj.

Sudoriente de la lago prezentiĝas neĝpintoj de Nyanqentanglha-montaro, kaj nordokcidente de ĝi kuŝas la ondforma altebenajo de norda Tibeto, Ĉirkaŭe de ĝi estas vastega ebenaĵo tapiŝita de verdaj herboj, kiu servas kiel bona somera paŝtejo. En la mezo de la lago sin trovas insulo. En intertempo de printempo kaj somero tien flugas grupoj kaj grupoj da sovaĝaj anasoj por restadi, kaj ĉie en la insulo vidiĝas anasovoj. La akvo de la lago estas iom sala. La lago abundas je altebenajaj fiŝoj kun maldikaj skvamoj aŭ sen skvamoj. Tibetanoj fiŝkaptas printempe. Ili provizas la loĝantojn de Lhasa kaj aliaj lokoj per siaj kaptitaj fiŝoj kaj ankaŭ per ili nutras brutojn.

Paŝtejo de Tibeto





Yarlungzangbo-rivero

VETURILO SUR LA ALTEBENAJO

Sur la stepo de norda Tibeto la tibetanoj paŝtas ne nur ŝafojn kaj ĉevalojn sed ankaŭ gruntbovojn. Gruntbovoj estas fortaj, lertaj en montogrimpado kaj ne timas ŝtormojn. La frostaj herbaj deklivoj kaj arbedoj estas neireblaj por ŝafoj. Sed ireblaj por gruntbovoj. Oni paŝtas gruntbovojn ofte kun la ŝafaro. Gruntbovoj povas per siaj kornoj forpuŝi neĝan tavolon for de la vojo por la ŝafaro kaj serĉi por si kaj la ŝafaro herbojn sub la neĝo.

Gruntbovo surhavas dikajn kaj longajn harojn, inter kiuj estas densaj lanugoj. Ĝiaj haroj estas fortranĉeblaj unu aŭ du fojojn ĉiujare, kaj ĉiu gruntbovo donas ĉ. du kilogramojn da lanoj, kiuj servas kiel bona tekstila materialo. La gruntbova lakto estas flava, densa kaj dolĉa. La freŝa fromaĝo farita el tia lakto estas unu el la ĉefaj nutraĵoj por

tibetaj paŝtistoj. Gruntbovajo estas pli delikata kaj bongusta ol ordinara bovajo.

Gruntbovo tre taŭgas por trafikado en montaro. Ĝi povas transporti kaj varojn trans altajn montojn kaj homojn trans glaciajn riverojn, tial oni nomas ĝin "Veturilo sur la Altebenaĵo". Ĝi povas esti komparata kun kamelo, veturilo en dezerto.





La sovaĝaj gruntbovoj en norda Tibeto estas bestoj propraj al Ĉinio. Ili vivas en grupoj en montaro pli ol 4,000 metrojn super la marnivelo. Ili havas apartan kutimon: Ili tage ripozas kaŝe en montoj kaj matene kaj vespere eliras por serĉi nutraĵojn. Kiam ili estos en seksardo, ili enpuŝiĝas inter bredatajn gruntbovojn por pariĝo.

GEJSEROJ

En iuj lokoj de Tibeto estas gejseroj. Ili elŝprucigas akvon intermite post ĉiu aŭ du horoj.

Antaŭ ŝprucigado, de malproksime oni jam povas aŭdi bruon ĉe la aperturo de la fonto. Kun laŭtiĝo de la bruo, la akvo elŝprucas spirale en la aeron kun vapora kolono de maksimuma alteco de 10 metroj. La gejseroj, kvazaŭ eksplodantaj vulkanoj, aŭdigas tondran sonon kaj disŝprucigas akverojn, kio formas ĉarman vidaĵon. En serena kaj venta tago la elŝprucigitaj akveroj disiĝas laŭ vento kaj fariĝas nebulo, kaj en la suno ili prezentas kurbajn lumarkojn oranĝan, helviolan kaj rozkoloran, kvazaŭ buntajn raketojn en festa nokto.

Aliaj gejseroj estas en riverfundoj. Ĉe ilia ŝprucigado, oni povas vidi kirlon sur la rivera surfaco. Poste ĉesas ŝprucigado kaj malmergiĝas malgrandaj fiŝoj mortintaj pro troa varmego. En la pasinteco tiuj valoraj termarmaj riĉfontoj ne estis utiligitaj, nun oni komencis ilin prospektori kaj ekspluati.



La Vipura Insulo

V
I
P
U
R
A

I
N
S
U
L
O

AMIKO, ĉu vi iam vizitis regnon de vipuroj? Mi faris esploron al la Vipura Insulo en Bohai-golfo de Ĉinio kun sciencaj laborantoj. Tiu mondo de vipuroj profunde min impresis.

Iun tagon de majo, ni en specialaj vestoj veturis de la urbo Lüda en la suda parto de Liaodong-duoninsulo nordokcidenten per du ŝipoj, tra la ondoj. Post veturado de ĉirkaŭ 3 horoj, subite la ŝipestro diris montrante foran nigran punkton: "Rigardu, jen la Vipura Insulo!" Ni ĉiuj rigardis en la direkto kun forta deziro tuj malkaŝi ĝian sekreton.

Niaj ŝipoj rondiris ĉirkaŭ la insulo kaj haltis ĉe la sudorienta angulo de ĝi, kie estas strando kun larĝeco de ĉ. 30 metroj. La insulo kun areo de ĉ. 4 kvadrataj kilometroj estas pli alta en la nordokcidenta parto kaj malpli alta en la sudorienta. Ĉirkaŭ la insulo troviĝas multaj groteskaj rokoj kaj kavernoj. De la montpinto ĝis la montpiedo etendiĝas ses ravinoj, en kiuj sin trovas densaj arboj kaj herboj. En aspekto, la Vipura Insulo ne multe diferencas de ordinaraj insuloj.

Ĝi tamen estas mondo de vipuroj. Neniu scias kun certeco, kiom da vipuroj vivas tie? Iuj asertis, ke tie estas ĉ. 300,000 vipuroj, aliaj ĉ. 500,000. Unuvorte, tre multaj, kaj tre venenaj.

Ni ascendis sur la gruzan bordon kaj komencis antaŭeniri atente observante je ĉiu paŝo. Tuj kiam ni venis al la faŭko de ravino, iu antaŭiranto subite ekkriis: "Jen, kio estas tio?" Ni ĉiuj rigardis en la direkto montrita de li: Tie estas objekto simila al bova fekaĵo. Ni atente rigardis kaj trovis ke ĝi estas granda vipuro kunvolviĝinta. Ĉu ĝi ripozis aŭ ruze atendis viktimon? Kiam ni estis pensantaj kaj diskutantaj pri tio, iu alia ekkriis: "Rigardu tiujn branĉojn!" Sur apuda arbedo troviĝis branĉoj volvitaj de dikaj velkaj branĉoj. Tiuj senfoliaj branĉoj estis efektive vipuroj. Ni pli zorge observis la ĉirkaŭaĵon kaj trovis multajn kamuflitajn vipurojn sur arbobranĉoj kun densaj folioj, apud rokfendoj kaj en herbaroj. Sur iuj arboj estis eĉ po ĉ. 30 vipuroj.

Kiam ni estis esplorantaj, apuso sidiĝis sur vipuron aspektantan kiel arbobranĉo. Aŭdinte

akran pepon ni vidis ke la vipuro jam firme tenas la kapon de la apuso per siaj dentoj. Kvankam la apuso estis multe pli granda ol la kapo de la vipuro, tamen la lasta grandigis sian faŭkon. Por engluti la apuson sen difekto de siaj faŭko kaj ezofago, ĝi unue turnis malantaŭen la malmolan bekon de la apuso, kunpremis ĝiajn flugilojn, kaj poste englutis ĝin.

Ne nur ordinaraj birdoj ne povas resti kaj vivi sur la insulo, sed eĉ la ferocaj agloj ne povas rivali kun vipuroj. Ni vidis jenan batalon: Aglo rondŝvebanta en la ĉielo subite sin jetis al arbedaro sur montodeklivo kaj rapide ekflugis kaptinte vipuron per la ungegoj. La vipuro baraktadis tutforte. Iu raportisto ĝoje diris: "Bone, la vipuro renkontis fortan rivalon!" Mi diris: "Ne, atendu momenton." Tiam ni vidis, ke la vipuro forte ĉirkaŭvolvis la korpon de la aglo. La aglo kriĉis dolore, ŝvebis ankoraŭ unu cirkon kaj falis teren. Kiam ni trovis la aglon, ĝi jam kuŝis senviva.

De kie venis la vipuroj sur la insulo? La geografoj kaj geologoj, kiuj partoprenis en la esplorado, faris respondon. Laŭ analizo de trovitaj fosilioj, la serpentoj en la mondo naskiĝis en la kretaceo de mezozoiko antaŭ 70,000,000 jaroj, kaj la vipuroj aperis en mioceno de kenozoiko antaŭ ĉ. 12,000,000 jaroj. Tiam la insulo estis parto de Liaodongduoninsulo kaj poste deapartiĝis pro montokrea movado. La serpentoj sur la duoninsulo malmultiĝis pro diversaj aktivadoj de homoj kaj dombestoj, dum tiuj sur la insulo vivis kaj generadis sen multaj ĝenoj.

Kial ne troviĝas alispecaj serpentoj krom vipuroj sur la insulo? Laŭ analizo, post sia de-

apartiĝo la insulo perdis fonton de dolĉa akvo. Pro tio, la ranoj, kiuj bezonis dolĉan akvon por vivi, pereis. Sekve, ankaŭ la serpentoj, kiuj bezonis preni ranon kiel sian ĉefan manĝaĵon, unu post alia mortis de malsato. La vipuro povas vivi, ĉar ĝiaj manĝaĵoj, kiel ekzemple ranoj, birdoj, insektoj kaj ratoj, estas multspecaj.


La insulo havas favorajn vivkondiĉojn por vipuroj. En somero tiea klimato estas humida kaj varma sub sudorienta musono. Densaj herboj kaj arboj nutras diversajn insektojn kaj multajn birdetojn. Pro tio vipuroj havas riĉan manĝaĵon. En aŭtuno kaj vintro, tie estas kompare varme, ĉar frosta vento estas barita de la alta nordokcidenta parto. Krome, tie estas multaj truoj kaj mola grundo taŭgaj por vintrodormo de vipuroj. Kiam printempo revenas kaj migraj birdoj transloĝas de la sudo al la nordo, la vipuroj komencas aktivadi ekstere. Kiam alflugas de la sudo migraj birdoj, malsataj kaj soifaj, trovas la insuleton en la vasta maro kaj descendas por ripozi, ili falas kiel frandaĵo en la buŝon de vipuroj. Kiam vintro proksimiĝas, la migraj birdoj komencas flugi de la nordo al la sudo. Kiam ili haltas sur la insulo por ripozi, vipuroj refoje utiligas la ŝancon por sin satigi, kaj poste

ili komencas vintrodormon. Tiamaniere la vipuroj vivas kaj generadas generacio post generacio sur la insulo.

Plejparto de la serpentoj de la mondo estas generata per ovo. Ili demetas maturajn ovojn en amason de putraj herboj aŭ arbofolioj por elkovi idojn. Tamen la vipuroj tenas maturan ovon en la salpingo por elkovi idojn per la varmo de sia korpo. Dum elkovado, la embrio prenas nutraĵojn de la ovo anstataŭ de la patrina korpo. Tiam generadon oni nomas "ovovivnasko". Ĉar tia generado estas neinfluebla de pluvego, diluvo, varmego, frostoj kaj naturaj malamikoj, la vipuroj povas generi idojn sekure.

Kompreneble, la vipuroj estas tre danĝeraj por la homoj kaj dombestoj, tamen la insulo kun vipuroj vivantaj en izoleco estas vera trezorejo. Vipura tinkturo povas kuraci reŭmatismon kaj akceli sangocirkuladon. Prilaborita vipurograso povas kuraci frostabsceson kaj flamlezitan haŭton. Vipuraj galo, veneno, pulvoro kaj malnova vipurhaŭto estas valoraj drogoj, kiuj povas kuraci reŭmatismon, moderigi doloron kaj mortigi insektojn: Tial nun la insulo estas protektata de la ŝtato por produktado de medikamentoj kaj scienca esploro de nia lando.

(ZHU JIAN)



Esplorado



LAO BAI:

Baleto

“Ĝaŭŝutun kaj

Nannona”

Pavo-princino Nannona

DE centoj da jaroj cirkulas mito pri la pavo-princino inter la taj-naciecaj popolanoj, kiuj loĝas en la regiono Xi-shuangbanna de sudokcidenta Ĉinio. Tiu ĉi mito estis enskribita en longa eposo de la taj-a nacieco. La baleto “Ĝaŭŝutun kaj Nannona”, kiun prezentis en Beijing (Pekino) la Ensemblo de la Xishuangbanna-a Subprovinco antaŭ nelonge, estas kreita laŭ la mito.

En antikveco troviĝis en la Regno Mengbanĝia bela kaj brava princo nomata Ĝaŭŝutun. Rifuzinte la svaton de la reĝo kaj korteganoj, li fuĝis en arbaron. Iutage, dum sia ĉasado, li estis kondukita de bela ora cervo al lago. Tiam sep pavo-princinoj de la Pava Regno alflugis al la bordo kvazaŭ sep nubope-

coj. Kiam ili banis sin en la lago, iu monstro-boao ĵetis sin al la plej juna princino Nannona. Ĝuste en tiu ĉi kriza momento, la princo pafis sagon al ĝi el la arbaro kaj savis la pavo-princinon. La princino dankis la princon kaj la lasta amis la antaŭan. Sekve ili dancis ĉe la bordo de la lago, esprimante amon inter si. Pro sia aspiro al la feliĉa vivo de la homa mondo la princino decidis edziniĝi al la princo kaj venis al la Regno Mengbanĝia. Kiam ili estis preparantaj sin por geedziĝo, najbara lando ekinvadis Mengbanĝia. La princo devis prokrasti la daton de geedziĝo kaj iri al rezisto kun siaj soldatoj. Tiam la reĝo kredis la mensogon de iu malica kortegano, ke la plago de milito estas alportita de la pavo-princino. Do la reĝo forpelis sin. Revenin-

te en triumfo la princo informiĝis pri la afero. Li rapide elkuris por serĉi ŝin. Venkinte ĉiajn malfacilaĵojn, li atingis la Pavan Regnon. La pavo-reĝino venigis sep princinojn tute similajn inter si en koloraj kaptukoj, por scii ĉu li povos rekoni la plej junan. Finfine li rekonis la sepan princinon kaj portis ŝin hejmen. En granda celebrado ili geedziĝis.

La plejparto de la adaptantoj, reĝisoroj kaj aktoroj de la baleto devenas de la taj-a nacieco kaj aliaj nacimalplimulto kiuj loĝas longtempe en la regiono. Tial, ilia prezentado estis plena de lokaj stilo kaj vivetoso. Pli ol 30 pecoj da belaj dancoj estas kreitaj laŭ la produktado, vivo, moroj, kutimoj kaj legendoj de la taj-nacieca popolo. La taj-aj

Princo kaj Pavo-princino dancas por esprimi sian amon.



virinoj montras belajn dancmovojn eĉ en siaj akvoportado, irado kaj ombreltenado, kaj tiuj dancmovoĵ videbliĝas en la baletoj.

La taj-a nacieco havas pli ol 700 milojn da membroj. Ili tre amas kanti kaj danci. En festotagoj kaj en sezonoj de rikoltado ili ofte kantas kaj dancas tage kaj nokte sub akompanado de tamburado. Pro tio tie cirkulas onidiro: Rizo maturiĝas kaj la taj-oj frezeziĝas. La dancoj de

la taj-a nacieco estas enhavoriĉaj kaj emociplenaj. Dum dancado oni plejofte duonkaŭras kun ritma tremado kaj ĉiuj artikoj de la tuta korpo montriĝas kurbigitaj, kio formas apartajn dancpozojn de tri kurbiĝoj. Ankaŭ la mangestoj estas diversaj kaj la sama dancmovo esprimas malsamajn sencojn per malsamaj mangestoj.

La taj-oj aparte ŝatas pavodanco. Ili prenas pavon kiel birdon belan, bonkoran, saĝan, liber-

aman kaj pacaman, kaj ankaŭ kiel aŭguron de feliĉo. Sekve ili esprimas siajn belajn dezirojn kaj idealon kaj prikantas sian naciecon per pavodanco.

La baletoj baziĝas ĝuste sur pavodanco. En ĝi la dancistoj ne nur imitas la movojn de pavo, sed ankaŭ donas al ĝi personigecon.

Yang Liping, kiu ludis la rolon de la pavo-princino, estas aktorino kun aĝo de iom pli ol dudekjaroj. La rigardantoj laŭdis, ke

Nupta danco



sia pavodanco pleniĝas de forteco, graciaeco kaj kvieteco kaj bone harmonias kun la muziko. Eĉ siaj piedoj, dorso, ŝultroj kaj fingroj havas delikatan esprimivon en la danco. Ŝi diris al mi: "Mi ŝatas observi la naĝadon de fiŝoj kaj la pavadon. La dancmovoj de Nannona estas projektitaj laŭ la movoj de la animaloj."

Tiu ĉi juna aktorino estas knabino de la baj-a nacieco kiu vivas en Xishuangbanna. De sia infaneco ŝi ŝatis dancon. Kiam ŝi estis 14-jara, ŝi estis sendita en la lokan ensemblon. Pro malbonaj kondiĉoj en la ensemblo ŝi ne ricevis normalan trejnadon en danco. Ŝi progresis en sia arto nur dank' al helpo de maljunaj aktoroj. Ŝi estis tre diligenta en ekzercado. Por ekzerci la gamojn, ŝi ligis ilin al du flankoj de la lito dum dormado. Foje ŝi endormiĝis. Kiam ŝi vekigis noktomeze, ŝi sentis siajn gamojn nemoveblaj. Ŝi mem sciis, ke la trejna metodo ne estas scienca, tamen ŝi prenis ĝin por hardi la volon.

La reĝisorino Zhu Lanfang estas taj-a dancistino kaj multe laŭdas ŝin. Ŝi diris, ke antaŭ 7 jaroj ili varbis nombron da infanoj-lernantoj kia Yang Liping. Post kelkjara trejnado ili fariĝis ĉefaj aktoroj de la ensemblo. Tiuj junaj aktoroj deziras dediĉi sin por heredi kaj disvolvi la dancarton de la taj-a nacieco.



NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ DE ĈINIO

Konstrui Novan Ponton

(88ES-156-S)

37 bildpaĝoj 16.5 × 19 cm.

Prezo: £0.35 US\$0.65

Nova Vesto de la Pupo

(88ES-159-P)

12 bildpaĝoj 18 × 20.8 cm.

Prezo: £0.22 US\$0.40

Sportistetoj

(88ES-160-P)

20 bildpaĝoj 18 × 20.5 cm.

Prezo: £0.22 US\$0.40

Ĉion Faru Mem Ni Ĉiuj

(88ES-161-P)

10 bildpaĝoj 17.7 × 20.5 cm.

Prezo: £0.22 US\$0.40

Tiu ĉi serio da bildrakontaj libroj por infanoj prezentas spiriton kaj vivon de ĉinaj infanoj en infanĝardeno.

Aŝma

(rakonto en versoj)

(10ES-253-S)

"Aŝma" estas popola eposo de sani-nacieco en Yunnan (Junnan)-provinco de Ĉinio. Ĝi varme prikantas diligitan kaj belan sanian junulinon Aŝma, kiu brave batalis kontraŭ perforta edzinigo.

La lingvo estas simpla kaj bela kaj karakterizita de nacieca gusto.

La libro estas ilustrita per koloraj bildoj.

84 paĝoj 16 × 18 cm.

Prezo: £0.95 US\$1.95

Rakontoj pri Fantom-spitantoj

(10ES-442-P)

Tiu libro kolektis 35 ĉinajn antikvajn rakontojn. Ĝi pri-skribas saĝon kaj sentimecon de antikvaj ĉinoj, kiuj kuraĝis insulti, forpeli, bati kaj kapti fantomojn.

94 paĝoj 11.8 × 18.5 cm.


Prezo: £0.45 US\$0.90

ELDONINTO: Fremdlingva Eldonejo,
Beijing, Ĉinio

ĜENERALA DISTRIBUANTO:

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

MENDU ĈE LA PERANTOJ AŬ REKTE ĈE LA
ĜENERALA DISTRIBUANTO



Parfuma Rozo

de LI TUO

(Novelo)

LU Xiaoling ŝatas florojn, precipe rozon. Tial kiam ŝi trovis en florvendejo parfuman rozon (*Rosa odorata*) en vazo, ŝi tuj ĝin aĉetis.

Parfuma rozo estas rara speco de rozo. Kiam Lu Xiaoling enaŭtobusigis, ŝi atente metis la vazon apud la sidlokon. La neĝblankaj floroj balanciĝantaj pro skuado de la veturilo elspiris delikatan bonodoron el siaj petaloj kaj altiris al ŝi la atenton de la apudaj pasaĝeroj. Multaj montris admiron en siaj okuloj. Iuj eĉ komencis pririgardi la posedantinon de la planto kun admiro. Kompreneble, Lu Xiaoling tion jam rimarkis. Ŝi mem sciis, ke kvankam ŝi estas jam 30-jara, tamen ŝi aspektas juna kaj bela, precipe hodiaŭ, ŝia nova plisita jupo de pala rozkoloro certe harmonias kun la blankaj rozfloroj. Sed ŝi ŝajnis sin tute senzorga kaj ĉiam direktis siajn okulojn ekster fenestron de la aŭtobuso.

La aŭtobuso baldaŭ venis ekster la urbon kaj iom post iom proksimiĝis al la hejmo de Lu Xiaoling. Tiam ŝi jam ne plu pensis sian rozon, multaj aliaj aferoj de la hejmo okupis ŝian koron. Ŝia edzo jam dum tri tutaj tagoj forestis, ĉu ho-

diaŭ li revenos aŭ ne? Antaŭ ol li foriris al laboro, ili kverelis. Se li jam revenis hodiaŭ, do Lu Xiaoling devas decidi, kian sintenon ŝi prenu rilate al li: Ĉi ŝajnigu sin ankoraŭ kolera kontraŭ li por devigi lin peti de ŝi pardonon? Kompreneble, estos bone se tio okazos, tamen Mingyan estas tre obstina, kaj se li neniel konfesos sian kulpon, ĉu ne rigidiĝos denove la rilato inter ili! Alia eliro estos: Ĉi mem forgesu la malagrablaĵojn kaj ili ambaŭ ĝoje aprecu kune la rozon kiam Mingyan revenos.

Post plurfoja ripozeto ŝi fine portis la florvazon al la supra etaĝo, kie ŝi loĝas, kaj haste ĵetis rigardon al la muro apud la pordo. Tie ŝi fiksis, antaŭ ol forlasi la hejmon, notoslipon: "Kamarado Mingyan, atentu, mi ĵus vaksis la plankon, bonvolu ne surpaŝi ĝin!" Nun la slipo restas najlita kaj ŝi sentas iom da malesperiĝo: Mingyan ankoraŭ ne revenis! Samtempe ŝi facile elspiregis, ĉar ŝi timis, ke Mingyan malpurigos la vaksitan plankon pro malatento. Pro vaksado de la planko ŝi levigis frumatene kaj laboregis sola la tutan antaŭtagmezon, kaj eĉ nun ŝi ankoraŭ sentas doloron ĉe la talio.

Lu Xiaoling portis la florvazon en la koridoron, poste ŝi malfermis sian pordon kaj stuporiĝis.

Kion ŝi vidis?

Li Mingyan jam revenis kaj nun dolĉe dormas sur la lito.

Post la purigado de la ĉambro Lu Xiaoling ŝanĝis la littukon kaj la kapkusenojn. Sed nun Li Mingyan kuŝas sur ĝi en plene makulitaj ŝtalistaj laborvestoj kaj lia pantalono estas tiel malpura, ke oni apenaŭ povas rekonii ĝian propran koloron. Probable timante malpurigi la liton, li sternis platan tukon sub sia korpo. Tamen ankaŭ ĝi ne estas pura, ĉar ŝi uzis ĝin por kovri objektojn dum la purigado, sed li ej!

Rigardante ĉion ĉi tion Lu Xiaoling ekscitiĝis kaj koleriĝis. Ĉu tiu dormanto en laborvestoj estas ŝia edzo?

Antaŭe estis kazoj, ke Li Mingyan revenis hejmen en laborvestoj, tamen la vestoj neniam montriĝis tiel malpuraj, kaj krome, plej grave por Lu Xiaoling, li ĉiam demetis ilin en la koridoro, sed neniam envenis la ĉambron en ili. Sed nun li fariĝis tia! Ne, la malpuraj laborvestoj ne estas tiel abomenindaj por

Lu Xiaoling, ĉar ankaŭ ŝi laboras en fabriko kaj ŝi bone scias, ke en intensa produktado estas neeble ĉiam teni sin pura eĉ por teknikistoj laborantaj en kabineto kiel Li Mingyan. Tio ne estas la problemo. Ŝi koleras kaj malĝojas pro tio, ke Li Mingyan fariĝis ĉiam pli indiferenta al la familio, ŝi kaj multaj objektoj tre valoraj por ili en la pasintaj jaroj. Lastatempe ofte okazis inter ili kvereloj kaj malakordajoj, kaj la kaŭzo kuŝas ĝuste en tio, jes en tio!

Lu Xiaoling subite eksentis lacegon kaj volis iom ripozi sur la sofo. Tiam ŝi rimarkis malordajn piedsignojn sur la planko, kiuj pikis ŝian koron pli dolore ol ĉio alia. Ŝi ekvidis la paron da pezaj ledŝuoj metitaj apud la lito sur la planko, sin pafis al ili kaj forte ĵetis ilin en la koridoron. Poste ŝi detiris la duonŝtrumpojn de sur la piedoj de Li Mingyan kaj ankaŭ ilin ĵetis en la koridoron. Ŝi malfermis la pordon kaj fenestrojn inkluzive tiujn de la malgranda "florĉambro" — ĝi estas transformita de Li Mingyan antaŭ kvar jaroj el la balkono per aldono de fenestroj.

Fininte ĉion ĉi tion Lu Xiaoling kuris al la lito kaj forte skuis la edzon: "Vi ankoraŭ dormas! Leviĝu, leviĝu!"

Li Mingyan dormis tiel profunde, ke Lu Xiaoling sukcesis vekti lin nur post plenforta skuado de liaj ŝultroj per ambaŭ manoj.

Li Mingyan malfermis siajn okulojn, tamen en longa momento li ne komprenas kio okazis. Estas la okuloj de la edzino plenaj de plendoj kaj kolero kiuj vekis lin.

"Kio okazis, Xiaoling? Kial vi ankoraŭfoje koleras?"

"Kio, kio! Rigardu kiel vi malpurigis la ĉambron!"

Li Mingyan rigardis la liton sub sia korpo, la plene malfermitajn pordon kaj fenestrojn kaj la ledŝuojn en la koridoro, kaj fine komprenis la seriozecon de la problemo, pretervole ekspirante profunde.

Li ne dormis dum pluraj tagoj kaj noktoj, ĉu tri tagoj kaj kvar noktoj aŭ kvar tagoj kaj tri noktoj, li mem ne sciis. Tiuj tagoj forpasis kiel ciklono. Por plenumi la taskon muldi 218-tunan ŝtalan ingoton, ĉiuj koncernaj laborejoj kaj fakoj de la ŝtalfabriko estis envolvitaj en la ciklonon. Hodiaŭ posttagmeze, kiam la muldado sukcesis, multaj homoj kolektiĝis ĉirkaŭ la varmega mulda truo kaj ne volis disiĝi. Kun ĝojo, fiero kaj eĉ respekto en la koro ili rigardis la giganton majeste starantan en la truo. Ĝi ja estas atingo de internacia nivelo en nia ŝtala industrio! Li Mingyan ne estis inter la homamaso, sed sidis sola apude fumante. Tio estas lia kutimo. Ĉiam kiam li finplenumis iun ajn signifoplenan aferon, li ne ŝatis interparoli pri ĝi kun aliaj, kaj preferis mediti en soleco. Ĉe tio sekretario de la fabrika partia komitato Liu aliris, sidiĝis kun li sur amaso da fajrrezistaj brikoj kaj serioze diris: "Malgranda Li, mi volas interkonsiliĝi kun vi pri io."

"Pri kio?"

Liu zorgeme diris: "Iru hejmen kaj ripozu!"

Li Mingyan surpriziĝis kaj diris tuj: "Ne, mi donos fizikan lecionon al junuloj de ĉirkaŭaj fabrikoj. Mi jam prokrastis tion unu fojon, do ne decas plua prokrasto."

"Eĉ se tiel, vi devas unue reveni hejmen, ĉar hodiaŭ via edzino ne deĵoras."

Kiu atendis, ke hejmenreveninte li kaŭzis tiel grandan malagrablaĵon.

Verdire, Li Mingyan estis morte dormema. Li intencis dormi nur momenton, sed fakte ne vekigis ĝis Xiaoling revenis. Rigardante la malpurigitajn littukon, kapkusenon kaj la vizaĝon de Xiaoling paliĝintan pro kolero, li ne sciis kion diri. Ĉu li diru al ŝi, ke li eĉ nun sentas doloron en la tuta korpo kaj kapturnon pro maldormo dum pluraj tagoj kaj noktoj, aŭ informu ŝin pri la sukcesa muldado de la

ŝtala ingoto por mildigi ŝian koleron? Ne, ne, ĉio ĉi tio ne helpas. Li senvorte rigardis ŝin, kaj subite lin atakis doloro en la koro: Kiel malfeliĉe estas, se ne ekzistas komuna lingvo inter la geedzoj!

"Kial, kial vi mutas?"

Lu Xiaoling mem ne sciis, kian parolon ŝi deziras de sia edzo. Ŝi nur sentis, ke ŝi havas multajn plendindaĵojn kaj ĉagrenon por elverŝi.

"Xiaoling, ne kolera, mi tuj lavos ilin."

Li Mingyan stariĝis, faldis la plaston tukon kaj deprenis la littukon kaj kapkusenon. Kiam li kliniĝis por levi lavkuvon, li subite sentis kapturnon kaj haste kaptis ripon de radiatoro per la libera mano. Sed neatendite, li faligis planken la florvazon kaj ĝin rompis.

Aŭdinte la bruon, Lu Xiaoling kuris el la ĉambro. Komence ŝi ne sciis kio okazis, sed poste ĵetiĝis al la frakasita florvazo. Ne nur la florvazo dispeciĝis kaj elmontriĝis el ĝi radikoj de la planto, sed ankaŭ rompiĝis la du plej dikaj branĉoj kaj neĝblankaj petaloj disfalis sur la plankon. Ŝi ne povis sin deteni de esploro. Ŝi sentis korsiran ĉagrenon: Mingyan ŝanĝiĝis, li fariĝis simple nerekonebla. Ŝi ekmemoris diron de iu: Ankaŭ amo estas kvazaŭ floro, kaj kiel ajn bele ĝi floras antaŭ la geedziĝo, ĝi pli aŭ malpli frue velkiĝos post la geedziĝo. Tion pensante, ŝi subite leviĝis kaj kriis plorante al li: "Vi egoisto, egoisto! Se mi sciis tion antaŭe, mi..."

Antaŭ ol ŝi finis la vorton ŝi sin turnis, kuris en la ĉambron, falis sur la sofon kaj ekploregis.

Kiam okazis ĉio ĉi tio, Li Mingyan ankoraŭ sentis kapturnon. Li tenis la kuvon en unu mano kaj firme ripon de radiatoro per la alia por ne fali. Nur post longa momento, kiam iom post iom malaperis la oraj steloj en liaj okuloj kaj li ne plu sentis turniĝon de la planko, li malfermis siajn okulojn kaj

mallevis sian kapon por vidi kion malbonan li denove faris.

Li Mingyan ne bone aŭdis la riproĉon de Lu Xiaoling, tamen ŝia plorado komprenigis al li la okazon.

Li malrapide kaŭriĝis kaj kun granda bedaŭro rigardis la rompitan rozon, ĉar ankaŭ li tre amas florojn. Por savi ĝin, li, ne trovinte konvenan vazon, prenis el la kuirejo fenditan argilan poton kaj atenteme transplantis la rozon en ĝin.

Post tio li ekprenis la poton kaj iris en la ĉambron por konsoli sian edzinon. Tamen kiam li vidis Xiaoling ploranta kun la vizaĝo kovrata per la manoj, li haltis.


Estis evidente, ke unu aŭ du konsolaj vortoj ne efikos sur ŝin. Kion fari? Ĉu peti de ŝi pardonon? Sed pri kio li kulpas? Ne, la problemo ne kuŝas en tio, kiu pravas aŭ kiu malpravas, sed en tio, ke inter ili ekaperis la malsama kompreno pri vivo, familio kaj amo. Kompreneble tio nur estas komenco, kaj li devas ĉiamaniere solvi la malakordon. Sed kiel malfacile estas tion fari.

Akra sonorado de la vekhorloĝo haltigis la meditadojn de Li Mingyan. Timante malfruiĝi al la leciono, li streĉis la vekhorloĝon antaŭ sia enlitiĝo. Nun la sonorado urĝis lin eliri.

“Xiaoling, hodiaŭ mi donos lecionon en la fabriko kaj mi devas tuj iri. Ni interparolu post mia reveno.”

Jam mallumiĝis kiam Lu Xiaoling ĉesis plori. Ekster la fenestro videbliĝis brilantaj lampoj en vicoj kaj vicoj da loĝdomoj tra poplofolioj susurantaj en la vespera zefiro; fore en la pala lumo de vesperruĝaj strioj klare evidentiĝis la nigra konturo de fumtuboj kaj laborejoj en la horizonto.

Lu Xiaoling stariĝis, rigardis eksteren tra la fenestro kaj en ŝian kapon venis ideo: Tuj iri al la fabriko, kie Mingyan laboras, ĵeti al li la de li forgesitan ŝlosilon por la



ĉambro, kaj poste reveni al la hejmo de la patrino, kiu vartas ilian infanon.

En la fabriko ŝi facile trovis Li Mingyan, ĉar je ŝia demando pri li oni tuj diris: "Li Mingyan? Li estas donanta lecionon en tiu domo."

Ŝi hezite sin direktis al la domo. Ŝi pensis, ke eble la leciono jam finiĝis, ĉar jam estis preskaŭ la naŭa nokte. Sed ĝi ankoraŭ daŭris. Lu Xiaoling ne sciis kion fari. Junaj laboristoj, kiuj montris al ŝi la vojon, fervore diris: "Vi estas la edzino de nia instruisto Li, ĉu ne? Eniru kaj atendu lin interne. Ĉu vi foje aŭskultis lian lecionon? Kiel majstre! Eniru, baldaŭ jam finiĝos la leciono!"

Apenaŭ ŝi malfermis malgrandan feran pordon de la domo, ŝin atakis odoro de lubrikoleo kaj aŭdiĝis voĉo de Li Mingyan el megafono.

En la unuaj momentoj post kiam ŝi enpaŝis en la domon, ŝi estis forte mirigita de la vidita sceno. La laborejo pleniĝis de homoj. Ili di-

rektis sian rigardon al unu sama loko, kie estis malgranda tablo kaj nigra tabulo, sur kiu estis skribitaj diversaj elektraĵoj kaj formuloj. Apud la nigra tabulo staris megafono kaj malantaŭ ĝi Li Mingyan estis donanta lecionon. Li en la samaj laborvestoj kaj en bekĉapo kun bluaj okulvitroj altiris al si la atenton de ĉiuj aŭskultantoj per siaj entuziasma parolo kaj brilantaj okuloj.

Komence Lu Xiaoling miris, kial ŝi neniam sciis ke Mingyan estas tiel lerta en parolado. Iom post iom ankaŭ ŝi estis absorbita kaj nenion pensis plu. Ĝuste tiam ekparolis denove Li Mingyan: "Nu, ni finu la lecionon por hodiaŭ. Se iu ajn havos demandojn, bonvolu iri al mi iam ajn ĉu en mia kabineto aŭ en mia hejmo..."

Kio? Al la hejmo? Ĉu ankoraŭ regos kvieto en vespero se ili venos kun demandoj? Lu Xiaoling nenion povis aŭdi plu.

Anstataŭ al siaj gepatroj Lu Xiaoling revenis al sia propra hejmo kun

konfuzaj pensoj. La kortuŝa sceno de la lekciado en la fabriko ondigos ŝian animon kaj pensigis ŝin, kial mankas al ŝi tia fervoro, ĉu devias ŝia aspirado en la vivo? La figuro de la vicleplena Mingyan dum la lekciado elnaĝis en ŝia kapo de tempo al tempo, kaj sekve ŝi pentis pro sia sinteno al la edzo. Tamen kiam ŝi pensis ke la petolemaj junaj laboristoj trudiĝos en ŝian puran kaj komfortan hejmon, ŝi ne povis ne maltrankviliĝi.

Subite, aŭdiĝis paŝbruoj en la koridoro kaj Lu Xiaoling tuj divenis, ke revenis Mingyan. En tiu momento ŝi konsciis, ke ŝi ja atendas la alvenon de la edzo. Sed kion ŝi diru al li? Absolute ŝi ne alparolos lin la unua. Tamen ŝi devis fari ion anstataŭe, ekzemple flegi florojn. Neatendite, tio, kion ŝia unua rigardo tuŝis, estis la parfuma rozo en la fendita argila poto. Ŝi haste sin klinis kaj ekakvumis ĝin per malgranda kruĉo kaj samtempe ŝi demandis sin mem: Kiel vivi en la estonto?

Ilustrita de WEI ZAIYUN



KURIOZA PAPILO-POKALO

Papilo-pokalo estas vinujo en la antikva Ĉinio. Kiam ĝi entenas vinon, oni povas vidi en ĝi buntan papilion fluganta. Post elĉerpiĝo de la vino, malaperas la papilio. La majstra arto por fari tian pokalon estis perdita antaŭ multaj jaroj, tia mirinda pokalo estis sukcese provfarita de la Ceramikaja Fabriko de la urbo Houma, Shanxi-(Sanhi)-provinco.

Iufoje, kiam la ceramikaja fabriko kolektas opiniojn de uzantoj pri la produktaĵoj, iu pli-ol-70-jara kam-

pulo de la ĉirkaŭurbo prezentis al ĝi sian papilo-pokalon postlasitan de siaj praaĵoj, por ke la fabriko ĝin esploru. La fabriko elfaris, kunlaborante kun optika institucio, novan papilo-pokalon, aplikante tradician metiarton kaj modernan optikan teorion. La pokalo similas al malgranda tintileto. Ĝia ekstera surfaco surhavas bildon "Du Drakoj Ludas kun Perlo", ĝia rando estas garnita per oraj linioj kaj ĝi interne estas bildigita per ruĝaj kaj bluaj floroj. Kiam oni verŝas vinon en la tason, en ĝi aperas papilio fluganta inter floroj.

LA REĜO DE LA ARBOJ

En la Wude-a Popola Komunumo de la gubernio Longxian de Guangxi (Guanghi) en suda Ĉinio troviĝas la plej granda ŝjenmu-arbo (*Burre-*

tiodendron hsienmu) de nia lando. Ĝi altas pli ol 30 metrojn kaj la krono larĝas 28 metrojn. La diametro de ĝia hom-alta trunko estas 2.96 metroj. Ĝi travivis jam 450-500 jarojn kaj nun kreskas ankoraŭ prospere.

Ŝjenmuo estas unu el la raraj arboj en suda Ĉinio kaj arbospecio difinita de la ŝtato kiel arbospecio protektenda kaj kulturenda. Ĝia ligno kun densaj vejnoj estas ruĝ-bruna kaj malmola. La mebloj el tiu ligno estas belaj kaj nedifekteblaj de vermoj. Kaj pro tio oni donis al ĝi la nomon "fera ligno".





Nova industria urbo Xiangfan

de TIANXING



VETURINTE de Wuhan (Vuhan) per vagonaro 320 km. nordokcidenten, oni povas atingi la urbon Xiangfan (Hiangfan) de nordokcidenta Hubei-provinco.

Ĝi estas kuniĝo de la du urbetoj Xiangyang (Hiangjang) kaj Fancheng (Fanĉeng). Ĝi estas antikva urbo kun historio de pli ol 2,800 jaroj. Ĝi estas brakumita de montoj en sudo kaj okcidento kaj de vasta ebenaĵo en oriento kaj nordo. La rivero Hanshui (Hanŝuj) trafluas la urbon kaj turniĝas suden en Changjiang (Jangzi)-riveron. Tie la tera kaj akva trafikoj estas oportunaj. Tiu ĉi urbo estis fama grava strategia loko en la antikva Ĉinio. Sed pro senĉesaj militoj en multaj jarcentoj, ĉe la Liberiĝo en 1949 ĝi restis malgranda kun 50,000 loĝantoj kaj areo de nur 7 kvadrataj kilometroj. La stratoj en la urbo estis mallarĝaj kaj pavimitaj per rulŝtonoj kaj ŝtonoplatoj. La popolo loĝis en mizeraj domoj, kies duono estis kabanaj. Ĉie videbliĝis fetoraj kanaletoj,


fonto de kuloj kaj muŝoj. La malriĉaj laboruloj vivis de plektado, teksado aŭ kulia laboro malmulte salajrata. Nemalmultaj fariĝis almozuloj kaj mortis de malsato.

Post 1949 la Xiangfan-a popolo, sub la gvido de la popola registaro, konstruis sian urbon en novan industriian urbon, dank' al sia 30-jara klopodado. Fruprintempe ĉi-jare, mi venis en Xiangfan kaj faris tie pli-ol-unusemajnan viziton.

Iun frumatenon mi ascendis monton en la antaŭurbo kaj rigardis la panoramon de tiu antikva urbo tra maldensa nebulo. Mi vidis la imponan Xiangfan-pontegon super la rivero Hanshui, kiu interligas Xiangyang en sudo kaj Fancheng en nordo. De tempo al tempo aŭdiĝas fajfo de sireno de trajno en malproksimeco; navete kuras aŭtoj sub la monto. Okcidente de la urbo estas industria parto, kaj oriente loĝkvartaloj en verdaĵoj. En la urbo regas plena viveco.

Xiangfan troviĝas ĉe la orienta rando de la montaro en okcidenta Hubei. Antaŭ la Liberiĝo oni veturis suden per boato kaj norden per ĉevalo, sen modernaj trafikiloj. De 1963 la ŝtato konstruigis la Wuhan-Danjiang-an, la Jiaozuo-Zhijiang-an kaj la Xiangfan-Chongqing-an Fervojojn, kiuj ĉiuj trapasas Xiangfan. La nova grandioza stacidomo kun centra atendejo kun areo de pli ol 2,000 kvadrataj metroj estas unu el la plej grandaj stacidomoj en Hubei-provinco. En Xiangfan estas ŝoseoj kondukantaj proksimen kaj malproksimen en ĉiuj direktoj, kaj oni povas aŭte veturi al ĉiuj ĝiaj najbaraj gubernioj kaj komunumoj. La hodiaŭa Xiangfan jam fariĝis centro de trafikado en nordokcidenta Hubei.

Ankaŭ la urba konstruado estas sukcesoplena en tiu urbo. La tuta Xiangfan rekonstruiĝis surbaze de la malnova urbo. La interkruĉigantaj stratoj kun mez-nombra larĝeco de 40 metroj estas borderitaj ambaŭflanke de abioj kaj uruŝioj. La merkatoj



Parto de la urbo Xiangfan

fabrikaj domoj vastiĝis ĝis 44,000 kvadrataj metroj, la nombro de la laboristoj kreskis ĝis 1,600 homoj, kaj la fabriko povas produkti tekstilaĵojn de pli ol 100 specoj de 36 normoj, el kiuj 80% estas eksportataj. Ĝia respondeculo diris al mi, ke ili pliiĝos, en la venonta jaro, 500 teksmaŝinojn produktantajn ŝtofon larĝan je 63 coloj kaj ĉiujare produktos por la ŝtato 12 milionojn da metroj da bonkvalita kemifibra ŝtofo.

estas prosperaj kaj stratoj homoplenaj. Daqing-strato en la mezo de Fancheng estis tombejo antaŭ la Liberiĝo. Sed nun tie aperis asfaltita larĝa strato kaj ĉe ambaŭ ĝiaj flankoj konstruiĝis magazeno, hotelo, metalaĵobutiko, medikamento-vendejo kaj ekspoziciejo. Sude de la strato kuŝas placo, kiu povas enteni 100 mil homojn. Ĉirkaŭe de la placo estas konstruitaj laborista klubo, kultura domo, teatro, kinejo kaj parko. Kaj proksime de la placo oni sin streĉas en konstruado de sporta halo kun 5,000 seĝoj kaj baldaŭ ĝin finkonstruos. Oriente de la sporta halo etendiĝas vicoj kaj vicoj da 5-etaĝaj loĝdomoj. La nomita strato, oni povas diri, estas miniaturo de la ŝanĝiĝo de Xiangfan. Nun la totala areo de la urbo ekspansiĝis ĝis 110 kvadrataj kilometroj, ĝia loĝantaro kreskis ĝis preskaŭ 280,000 kaj la plank-areo de ĝiaj loĝdomoj atingis 4 milionojn da kvadrataj metroj.

Xiangfan estas abunda je kotono. Sed pro manko de tekstilaj fabrikoj antaŭ la Liberiĝo

oni devis transporti kotonon al aliaj lokoj por ĝin prilabori. Troviĝis en la urbo nur kelkaj malgrandaj metiejoj kun 200-300 laboristoj, kiuj faris objektojn ferajn, lignajn kaj bambuajn. Mankis en la urbo eĉ kudrilofarejo kaj alumetofarejo. En 1953 fondiĝis en la urbo la Xiangfan-a Teksejo. Komence ĝi havis nur 37 laboristojn kaj 17 ferajn-lignajn teksmaŝinojn kaj produktis krudajn ŝtofojn kaj pakumajn tolojn. Kvankam tiu malgranda fabriko havis nur simplajn ekipaĵojn, tamen la aspirantaj laboristoj pene laboris kaj energie disvolvis produktadon. Dum pli ol 20 jaroj de post sia fondiĝo la fabriko ĉiujfoje superplenumis la planon difinitan de la ŝtato. Ekde la 70-aj jaroj la laboristoj komencis lerni kaj apliki la eksterlandan avangardan teknikon, mem faris ekipaĵojn kaj plirapidigis la disvolviĝon de produktado. Nun la fabriko havas preskaŭ 600 maŝinojn de diversaj specoj, inkluzive de 500 modernaj teksmaŝinoj, kaj 3 aŭtomatajn tinturajn liniojn. La areo de la

lita kemifibra ŝtofo. Dum la lastaj jaroj la ŝtato konstruigis, proksime de tiu fabriko, modernan tekstilan entreprenon de produktopotencialo de 80,000 spindeloj kaj pli ol 2,000 teksmaŝinoj kaj aliajn dekelkajn fabrikojn de ŝtofo, mantuko, trikotajo, ŝtrumpetoj k. a. La tekstila kaj malpeza industrioj kun abundaj krudmaterialoj fariĝos ĉefaj industriaj branĉoj de Xiangfan kaj pli rapide disvolviĝos.

Ankaŭ la maŝina industrio de tiu urbo rapide progresas. La robotmaŝino de B6050-tipo produktita de la Xiangyang-a Ilmaŝina Fabriko bone funkcias. La objektoj prilaboritaj per tia maŝino estas tre glataj kaj brilaj. Kaj tia robotmaŝino vendiĝas en Usono, Turkio, Nederlando, Xianggang (Hongkong) kaj aliaj landoj kaj regionoj. La traktoro de tipo "Dongfanghong 20" produktita de la Xiangyang-a Traktora Fabriko havas grandan potencon kaj bonan efikon. Ĝi kun korpo malgranda kaj malpeza estas facile turnebla, tial ĝi estas tre ŝatata de la kam-

puloj en la montregionoj. Por plenumi la bezonon de la popola vivo, oni konstruis en la urbo kudromaŝinan fabrikan kiu povas produkti 100,000 kudromaŝinojn jare. La kudromaŝino produktita de tiu fabriko estas belaspekta kaj facile uzebla kaj havas grandan debiton en la lando.

Kun la disvolviĝo de la industrio, ankaŭ elektroniko estas vaste uzata. Dank' al siaj zorga projektado kaj ripetada provado, la laboristoj de la Xiangfan-a Fabriko de Komputera Eksteraj sukcese faris pinglan larĝlinigan han-lingvan tajpilon, kian Ĉinio neniam antaŭe havis. Tia aparato estas aplikata en scienca kalkulado, traktado de donitaĵoj, cifera komunikado kaj aŭtomata regado. Ĝi estas ideala liveraĵo por la konstruo de nacidefendo kaj administrado de entreprenoj. Bankaj oficistoj de Xiangfan ekuzis elektronikan bilet-komputilon kaj poste mem faris tablan elektronikan kontomaŝinon, kiu havas bonan kvaliton kaj estis premiita en la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita en marto de 1978.

Nun en tiu urbo estas 280 fabrikoj, kiuj produktas pli ol 500 objektojn kun pli ol 5,000 specoj, kiaj traktoro, ilmaŝino, kemia sterko, cemento, kemia fibro, televidilo, radioricevilo kaj kudromaŝino. Proksimume 60 specoj de tiuj produktaĵoj vendiĝas en dekoj da landoj kaj regionoj de la mondo. La totala produktovalorado de industrio de Xiangfan en la pasinta jaro atingis 800 milionojn da juanoj, t.e. ĝi pliiĝis je 23.1% kompare kun tiu en 1978, kaj ĝia kresko estis la plej rapida en Hubei-provinco.


Kun la ekonomia disvolviĝo, progresis ankaŭ la eduka kaj higiena aferoj de tiu urbo. Antaŭ

la Liberiĝo la urbo havis nur 9 elementajn lernejojn kaj 3 mezlernejojn kun pli ol 3,000 lernantoj, el kiuj plejparto estis infanoj de riĉuloj. En la urbo troviĝis nur unu hospitalo kun 20 malsanulaj litoj. La kotizo por kuraci en hospitalo estis terure alta. Se malriĉuloj malsaniĝis, ili nur povis peti helpon de migrantaj kuracistoj kaj iliaj drogherboj. Kaj nun en la urbo troviĝas 65 elementaj lernejoj kaj 44 mezlernejoj kun 57,000 lernantoj kaj ankaŭ kelkaj teknikaj kolegioj. En la urbo estas 14 hospitaloj kun pli ol 1,400 malsanulaj litoj. Apud la pitoreska


historia loko Xijiachi konstruiĝis sanatorio por laboruloj. Se laboruloj malsaniĝas, ili povas ricevi ĝustatempan kuracon kaj ripozon. Estas jam tute eliminata tinio, kiu cirkulis en okcidenta Hubei en la malnova socio. Estas bone kuracata kaj preventata ankaŭ la tiroida ŝveliĝo. Kaj la sano de la popolo fariĝas ĉiam pli forta.

La antikva urbo Xiangfan ŝanĝis sian fizionomion en la lastaj 30 jaroj. Kiam iu kanada amiko, kiu iam loĝis en tiu urbo antaŭ la Liberiĝo, revizitis ĝin, li diris kun admiro: "Miriga estas ĝia ŝanĝiĝo!"

Sciencistoj provas pinglan larĝlinigan han-lingvan tajpilon.



Loĝejo de la antikva milita strategiisto Zhuge Liang





CINIO RIĈA JE FERMINAJO

Laŭ proklamo de nia Geologia Ministerio, Ĉinio havas 44 miliardojn da tunoj da ferminaĵo en rezervo, inter kiuj 8.5 miliardoj estis nove eltrovitaj en la lastaj kvar jaroj. Ekde la jaro 1975 ĉinaj geologoj, sub la kuna organizado de la Geologia Ministerio, la Metalurgia Ministerio kaj la Ĉina Akademio de Sciencoj, prospektoris ferminejojn en dekelkaj lokoj de la lando. Post 4-jara prospektorado ili trovis dudek kelkajn ferminejojn kun respektiva kapacito de pli ol 10 milionoj da tunoj.

SUBTERA AKVOREZERVEJO EN NORDA ĈINIO

La unua granda subtera akvorezervejo konstruita sur antikva fluejo en la Nordĉinia Ebenajo estas lanĉita en Hebei-provinco. Ĝia totala kapacito estas 480 milionoj da kubmetroj el kiuj pli ol 100 milionoj da kubmetroj povas esti uzataj por irigacii pli ol 15,000 hektarojn da agroj. Nun oni faras konstruadon por konduki akvon el proksimaj riveroj en la akvorezervejon. Post la finkonstruado la akvorezervejo povas irigacii pli ol 30,000 hektarojn da agroj.

INTERNACIA KUNVENO PRI PETROLA GEOLOGIO EN BEIJING

Post 5-taga fruktodona interŝanĝo de sciencaj scioj kaj spertoj, la nomita kunveno fermiĝis en Beijing (Pekino) en la 22-a de marto. En la ferma ceremonio la aganta pre-

zidanto s-ro Howard Brand, estro de la UN-a Departemento de Teknika Kunlaboro por Disvolvo, diris, ke la kunveno "ebligas al la Unuiĝintaj Nacioj uzi sian povon kolekti fakajn sciojn de la tuta mondo por libera interŝanĝo de scioj kaj spertoj por la profito de la homaro." Li diris ankaŭ: "Kun tiaj klopodoj de internacia kunlaboro ni kredas, ke la bazo de la mondaj naturaj rimedoj povas esti signifoplene pligrandigita."

En la kunveno estis voĉlegitaj kaj disdonitaj 43 disertaĵoj de 42 geologoj el 25 landoj pri respektivaj esploraj atingoj kaj sperto. La sciencistoj kaj specialistoj de Pakistano, Irano, Alĝerio, Meksikio kaj aliaj disvolviĝantaj landoj opiniis, ke la kunveno bone efektivigis sian celon, t.e. oni interŝanĝis esplorajn atingojn kaj prospektorajn spertojn de petrola geologio por antaŭenpuŝi la petrolan geologion de la disvolviĝantaj landoj kaj akceli la progresadon de ilia petrola industrio.

INTERNACIA SIMPOZIO PRI RIVERA SEDIMENTO EN BEIJING

La nomita simpozio fermiĝis en Beijing en la 29-a de marto.

Sciencistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj faris raporton pri speciala temo en la simpozio, kiu daŭris kvar kaj duonan tagojn. Ili varme diskutis pri la problemoj ilin interesantaj kiel sablo-produktado en riverbaseno, sedimenta transporta meĥaniko, rivera evoluo, akvorezerveja sedimento kaj laboratoriaj kaj kampaj mezuraj teknikoj kaj modelaj provoj de sedimenta transporto. Ili ankaŭ pridiskutis plej novajn esplorajn atingojn tiuflankajn.

En la ferma ceremonio d-ro S. Dumitresku, ĉefo de la akvo-sciencia fakto de Unesko, diris ke la simpozio estas granda sukceso. Li diris, ke Ĉinio faris kreskantan kontribuon al internacia kunlaboro en la kampoj

de scienco, eduko, kulturo kaj informo. Danlanda profesoro F. A. Englund dankis la gastigantojn pro la laboro, kiun ili faris por la simpozio.

GRANDAJ ATINGOJ DE SCIENCA ESPLORO EN SHANGHAI

Sciencistoj kaj teknikistoj de Shanghai (Ŝanhajo) akiris dek scienc-esplorajn atingojn de internacia avangarda nivelo de la 70-aj jaroj. Antaŭ nelonge la Shanghai-a Popola Registaro okazigis kunvenon por premii scienc-esplorajn atingojn, kaj en tiu kunveno la dek atingoj ricevis unuagradan premion.

Ĝingangmicino, preparita de la Shanghai-a Pesticida Instituto, estas nova antibiotiko kontraŭ malsano de rizo. La jon-radia tajla maŝino, farita de la Shanghai-a Metalurgia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj uzata en delikata prilaborado, atingis la maksimuman precizecon de unu mikrono. Ĝi estas aparta teknika ekipaĵo de Ĉinio por delikata prilaborado de grandskala aŭ ultragrandskala integra cirkvito. La Shanghai-a Dua Fanda Fabriko, la Shanghai-a Industria Universitato k. a. kreis novan metodon por fari titanon, kio kontribuis por rapida disvolviĝo de la titana industrio.

LOĜDOMOJ DE BEIJING KRESKAS PLI RAPIDE

La plankareo de loĝdomoj de Beijing, kiuj estos finkonstruitaj en tiu ĉi jaro, atingos pli ol 3 milionojn da kvadrataj metroj, superante tiun de la jaro 1979, rekordon en la historio. La loĝdomoj konstruitaj en 1979 en tiu urbo havas plankareon de 2.82 milionoj da kvadrataj metroj. Kaj 12 novaj loĝkvartaloj en la urbo komencis aŭ komencos konstruiĝi en tiu ĉi jaro.

Ĝing en la Pekina opero



Civila ĝing



Batala ĝing

Ĝing estas speco de aktoroj en la Pekina opero ludantaj virajn rolojn. *Ĝing* dividiĝas en du kategoriojn, nome civilan kaj batalan *ĝing*. La vizaĝoj de la *ĝing*-aktoroj estas pentritaj kaj iliaj vestaĵoj estas malsamaj laŭ la karaktero de la ludataj roloj.

Teatra sceno kun ĝing kiel ĉefrolulo.





Fiŝistoj de Shantou

Artistinoj antaŭ prezentado

Shantou situas en la sudorienta parto de la provinco Guangdong, rigardante al la Suda Ĉina Maro. Tie la loĝantoj vivtenas sin ĉefe per fiŝado. En fiŝkapta sezono, sennombraj ŝipoj aktivas sur la maro. Kaj en aliaj sezonoj fiŝistoj riparas retojn kaj tordas kanabajn ŝnurojn; arta taĉmento prezentas por la fiŝistoj. Nun la fiŝistoj fiksloĝas sur la tero. Iliaj infanoj povas viziti lernejon. Maljunaj fiŝistoj ne bezonas plu fiŝadi surmare, ili prizorgas siajn genepojn hejme, aŭ sunumas fiŝojn.

Veniis arta taĉmento!





Sunumi fiŝojn

(Supre) Al fiŝado

(Dekstre meze)
Maljuna fiŝistino



En la hejmo de fiŝisto



Interesa ludo

Elementa lernejo por infanoj de fiŝistoj



Kiel grandaj omaroj!





La fama ĉina verkisto Ba Jin (Bakin) premias la verkinton Jiang Zilong (la maldekstran) de la plej bona novelo en 1979.



ELEKTADO DE BONAJ NOVELOJ DE 1979

PUBLIKIGIS la rezulto de tiu elektado, en kiu voĉdonis 257,000 personoj inkluzive de transmaraj ĉinoj en Usono kaj FR Germanio kaj fremdlandaj studentoj kaj japanaj amikoj en Ĉinio. Inter la elektitaj noveloj troviĝas "Enoficiĝo de Fabrikestro Qiao" de Jiang Zilong, "Generalo en Urbeto" de Chen Shixu kaj "Rakonto Erare Redaktita" de Ru Zhijuan. En la premidona kunveno okazinta antaŭ nelonge en Beijing (Pekino), Bakin, la unua vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, premiis, en la nomo de la Juĝa Komitato, la verkintojn per mono kaj memora kajero.

"GRAFO DE MONTO KRISTO" SURSCENIGITA

Lastatempe sursceniĝis en Jinan (Ginan), ĉefurbo de Shandong (Sandong)-provinco, moderna dramo "Grafo de Monto Kristo" verkita de Zhai Jianping, Mao Rong kaj Liu Qingyuan de la provinca drama trupo adaptante la samtitolan romanon de Alexandre Dumas de Francio. Ĝi emfaze esprimis la filozofian kaj moralajn ideojn de la romano. En la sepakta dramo, aldoniĝis scenoj de kanto kaj danco por enkorpigi la romantikecon de la aventura rakonto. La adaptantoj simpligis la intrigon por koncentre montri la fidelecon de la heroo Edmond Dantes al siaj amikoj kaj lian malamon al la malamikoj.

EKSPOZICIO DE POŝTMARKOJ EN BEIJING

Lastatempe la Ĉina Poŝtmarka Kompanio aranĝis la nomitan ekspozicion en la Belarta Domo de Beijing, en kiu montriĝis 400 serioj da poŝtmarkoj eldonitaj en la pasintaj 30 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko. Ili portas bildojn de raraj plantoj kaj animaloj, ĉinaj pejzaĝoj, historiaj objektoj ktp. Inter ili troviĝas serio de ses poŝtmarkoj kun bildoj de pandoj pentritaj de la fama pentristo Wu Zuoren. Ĝi estis eldonita en 1973, kaj pli ol miliono da serioj estis venditaj en du jaroj.

"BEIJING-ANOJ" SURSCENIGIS EN NOVJORKO

En la 25-a de marto sursceniĝis en iu teatro de Novjorko "Beijing-anoj", moderna dramo de la ĉina fama dramisto Cao Yu. La prezentado estis kune aranĝita de la Teatraĵo-studa Centro de Kolombia Universitato kaj la Usona-Ĉina Arta Interŝanĝa Centro. Ankaŭ Cao Yu, kiu estas vizitanta Usonon, tie rigardis la prezentadon de la usonaj artistoj en la angla lingvo.

La prezentado de la dramo daŭris du semajnojn en tiu urbo. La usonaj artistoj planas sursceniĝi alian dramon de Cao Yu "Sunleviĝo" nelonge poste.

ĈINAJ SPORTISTOJ GAJNIS 7 ĈAMPIONECOJN

La Rumana Internacia Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso okazis de la 29-a de februaro ĝis la 2-a de marto en la urbo Arad en la okcidenta parto de Rumanio. En la konkurso la ĉinaj sportistoj gajnis ĉiujn 7 ĉampionecojn kaj 4 subĉampionecojn.

En ĝi partoprenis pli ol 130 sportistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Francio, la Germana Demokrata Respubliko, Jugoslavio, Pollando, Sirio kaj Rumanio.

ĈINAJ ATLETOJ EN USONO

En la 11-a Atletika Konkurso de Martin Luther King okazinta en Palo Alto de Kalifornio, ĉina trisalta ĉampiono Zou Zhenxian, tenanto de la azia rekordo, gajnis la unuan lokon de tiu sportbranĉo per rezulto de 16.35 metroj, kaj alia ĉina sportistino Dai Jianhua gajnis la unuan lokon de 100-metra barierkuro per 14.01 sekundoj.

Korekto

Bonvolu legi "60" anstataŭ "15" en la linio 11, dekstra kol., p. 55, n-ro 4.



Antikvaj pentraĵoj en la Muzeo de Imperiestra Palaco

de OUYANG CAIWEI

EN la Muzeo de Imperiestra Palaco de Beijing (Pekino) konserviĝas multaj ĉinaj antikvaj pentraĵoj. Se vi ilin rigardas tie dum duontago, vi povas havigi al vi ĝeneralan konon pri la ĉina piktura historio de pli ol 2,000 jaroj.

La Imperiestra Palaco konstruiĝis en la 15-a jarcento. Antaŭe ĝi estis loĝejo de imperiestroj de la dinastioj Ming (1368-1644 p.K.) kaj Qing (1644-1911 p.K.) kaj nun uziĝas kiel muzeo. Ĉiutage ĝin vizitas miloj kaj dekmiloj da homoj, inter kiuj plejparto estas en- kaj eksterlandaj turistoj, kaj krome ankaŭ studentoj, pentristoj, historiistoj k.a. La centmiloj da pentraĵoj konservataj en la Imperiestra Palaco servas kiel gvidisto por koni la ĉinan pikturon.

En la muzeo elmontriĝas ĉinaj pentraĵoj de ĉiuj skoloj kaj stiloj, de silkaj pentraĵoj faritaj a. K. ĝis verkoj en la frua periodo de la 20-a jarcento.

Mi gvidu vin viziti la Galerion de Pentraĵoj en la Imperiestra Palaco por rigardi eliton de la ĉina kultura heredaĵo, kaj vidi kiel pentristoj de ĉiuj dinastioj reaperigis sur siaj verkoj ĉiutagan vivon de diversaj homoj de nia antikva civilizacia lando, de la plej altaj regantoj ĝis la laboranta popolo.

La ĉina pikturo havas historion de ĉirkaŭ 5,000 jaroj, tamen la plej fruaj verkoj nun konservataj apar-

tenas al la periodo de la Militantaj Regnoj (475-221 a. K.).

En la Galerio de Pentraĵoj estas eksponita silka pentraĵo trovita en tombo de Chu-regno (475-223 a. K.) en la periodo de la Militantaj Regnoj, en Changsha (Ĉangŝa) de Hunan-provinco. Sur la pentraĵo oni bildigis per fortaj maldikaj strekoj viron kun spado ĉe la talio, kondukantan ŝipforman drakon sur akvo tenante la kolbridon en la mano. Alia silka pentraĵo estas trovita en tombo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K.- 8 p. K.) ĉe Mawangdui en la antaŭurbo de Changsha. Ĝi temas pri antikva mito kaj prezentas tri malsamajn mondojn ĉielan, homan kaj sub-

Printempa Ekskurso

pentrita de ZHAN ZIQIAN



teran. En la "mondo homa" estas pentrita maljunulino, kiu prezentas la virinon en la tombo.


La ĉina pikturo atingis sian kulminon en Tang-dinastio (618-907 p. K.), precipe en la regperiodo de la imperiestro Xuanzong (712-756 p. K.)


La ĉinstilaj pentraĵoj sin dividas en du kategoriojn, nome pentraĵojn faritajn per delikataj strekoj kaj fortaj koloroj, kaj tiujn faritajn per nigra inko aŭ kun palaj koloroj, sur kiuj oni povas prezenti poeziajn per malmultaj strekoj.

Inter la pentraĵoj en la muzeo estas kolora pentraĵo sur silkajo "Laŭ la Poemo pri Diino Luoshen" kun larĝeco de 27.1 centimetroj kaj longeco de 572.8 centimetroj, verkita de Gu Kaizhi en la Orienta Jin-dinastio (317-420 p. K.). La artisto kreis sian verkon laŭ la longa poemo "Pri Diino Luoshen" verkita de Cao Zhi, poeto en la periodo de Tri Regnoj (220-265 p. K.). Sur la pentraĵoj estas bildigita diino Luoshen en draka ĉaro flosanta sur akvo, kio estas tre riĉa je mita etoso. Kvankam ĝi estas kopio de Song-dinastio, tamen ekspertizistoj konstatis, ke ĝi estas fidela al la originalo.

Kun apero de liriko priskribantaj montojn kaj akvojn, kreiĝis pejzaĝaj pentraĵoj en la dinastioj Wei (220-265 p. K.) kaj Jin (265-420 p. K.), kaj tiuspecaj pentraĵoj eniris en sian maturan periodon en la dinastioj Sui (581-618 p. K.) kaj Tang. La plej frua pejzaĝa pentraĵo nun konservata estas "Printempa Ekskurso" verkita de Zhan Ziqian de Sui-dinastio. Ĝi spegulas la stilon kaj artan karakteron de pejzaĝaj pentraĵoj antaŭ Tang-dinastio. Kun blua monto, lazura lago, helruĝaj persikfloroj kaj flosantaj blankaj

Lotuso kaj Birdeto
pentrita de **BADASHANREN**





Skizo de Valoraj Animaloj

pentrita de HUANG QUAN

nuboj kiel fono ĝi prezentas arojn da ekskursantoj sur ĉevaloj, en ŝipo aŭ piedirantaj. La verko montras, ke en la sesa jarcento la ĉinaj pentristoj jam fundamente solvis la problemon kiel pentri naturajn pejzaĝojn kaj prezenti perspektivon.

“Mil-lia Rivero kun Montoj” de Wang Ximeng estas tre elstara pejzaĝa pentraĵo de Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.). En sia aĝo de 18 jaroj li kreis tiun pentraĵon, en kiu li uzis kolorojn bluan kaj verdan kiel tiujn de juvelo por montri majestecon kaj belecon de la patrolando. Li heredis kaj riĉigis la artan tradicion de bluj kaj verdaj pejzaĝaj pentraĵoj.

“Pejzaĝo de la Riveroj Xiao kaj Xiang” de Dong Yuan en la periodo de la Kvin Dinastioj (907-960 p. K.) estas eminenta nigrainka pentraĵo. Dong Yuan lertis en pentrado de pejzaĝoj de suda Ĉinio. Tiu pentraĵo kun proksima rivero, sur kiu iuj pramas kaj aliaj fiŝkaptas, kaj foraj montetoj kovrataj de verdaĵoj neklare videblaj en nebulo, fidele prezentas pejzaĝon de akvoriĉa kaj hu-

mida lando. Bonzo Juran heredis la pentrostilon de Dong Yuan kaj ili ofte estas menciitaj kune en la piktura historio. Iliaj pentraĵoj multe influis posteulojn kaj iom post iom formiĝis skolo de pentraĵoj ĉefe nigrainkaj faritaj per liberaj strekoj por esprimi la pensojn kaj sentojn de la aŭtoro. Tiu skolo preskaŭ fariĝis la ĉefa fluo de pejzaĝaj pentraĵoj en la dinastioj Ming kaj Qing.

“Mirakla Pejzaĝo de la Riveroj Xiao kaj Xiang” de Mi Youren eksponita en la Galerio de Pentraĵoj estas reprezentanta verko de la supre menciita stilo pri varianta suda pejzaĝo. Tiu pentristo opiniis, ke pentrado devas prezenti la koron de la aŭtoro. Per malmultaj strekoj li pentris du kunfluiĝantajn riverojn, fumon, blankajn nubojn, forajn montojn kaj densan arbaron. Kvankam la pentraĵo estas senkolora, tamen ĝi sentigas al la rigardantoj bluan kaj verdan.

La periodo de la Kvin Dinastioj estas grava disvolva etapo de la ĉina piktura historio. Huang Quan estis tiam fama pentristo pri floroj

kaj birdoj. En la galerio estas eksponita lia “Skizo de Valoraj Animaloj” sur kiu estas pentritaj dek malsamaj birdoj, du testudoj kaj pluraj insektoj. Ili en diversaj pozoj tre similas la vivajn. Huang heredis tradician teknikon de apliko de delikataj strekoj kaj fortaj koloroj. Liaj tekniko kaj stilo donis grandan influon al kortegaj pentraĵoj de Song-dinastio.

Tute malsaman stilon havas “Aŭtuna Plorsaliko kaj Du Korvojn” de Liang Kai de Suda Song-dinastio (1127-1279 p.K.). Per malmultaj strekoj li vivece bildigis plorsalikon kaj flugantajn korvojn, kiuj formis pejzaĝon de malfrua aŭtuno.

La kvanto de la pentraĵoj de la dinastioj Ming kaj Qing en la Muzeo de Imperiestra Palaco estas sufiĉe granda. Inter ili troviĝas verkoj de kortegaj pentristoj Lin Liang kaj Lu Ji, de literaturistoj-pentristoj Shen Zhou, Wen Zhengming kaj Tang Yin de Ming-dinastio, de Zhu Da, Ren Bonian kaj Wu Changshi kaj verkoj de Yangzhou-skolo de Qing-dinastio.



Huan Huan

Tri edziniĝo de Huan Huan

de XIN ZONG

EN februaro de la kuranta jaro, la Uena Zoologia Ĝardeno de Tokio de Japanio okazigis solenan geedziĝan ceremonion por la gepandoj Huan Huan kaj Kang Kang. Multaj japanoj de diversaj lokoj veturis al Tokio por gratuli la novajn geedzojn. La novaĵo multe korusis ĉinan popolon — mastron de la hejmloko de la nova edzino.

I

Kial la pandino Huan Huan edziniĝis en Japanio? Pri tio ni

devas paroli komence de la gepandoj Lan Lan kaj Kang Kang.

En 1972, dum la vizito de la japana ĉefministro Tanaka en Ĉinio, ĉefministro Zhou Enlai, en la nomo de la ĉina popolo, donacis al la japana popolo paron da pandoj — Lan Lan kaj ĝia edzo Kang Kang. Ekde tiam la gepandoj fiksloĝis en la Uena Zoologia Ĝardeno. La japana popolo tre ŝatis ilin kaj konstruis por ili komfortan kaj luksan domon, elspezinte 40,000,000

enojn. Jurnalaj, radiodissendaj kaj televidaj servoj ofte raportis pri ili kiel pri steloj. Multaj fabrikoj kaj magazenoj prenis desegnaĵojn pri pandoj kiel siajn markojn. Ĉie vidiĝis libroj, presitaj bildkartoj kaj reklamoj kun fotoj de pandoj. En Tokio kaj aliaj urboj fondiĝis asocioj de pando-amantoj. Multaj rigardantoj portis aŭ poŝte sendis al ili sukerkanojn, junbambuojn, dolĉajn jujubojn kaj aliajn fruktojn. Nemalmultaj homoj de malproksime venis al la zoologia ĝardeno kaj vicatendis antaŭ la pordo du aŭ tri horojn por ilin rigardi. La amindaj Lan Lan kaj Kang Kang profunde impresis la japanan popolon kaj reaperis en sonĝo de japanaj infanoj. En la pasintaj pli ol 7 jaroj aperis longtempa manio de pandoj en Japanio, la nombro de la homoj de tiuj, kiuj rigardis la gepandojn, atingis 36,000,000.

II


Estis malfeliĉe, ke la pandino Lan Lan subite malsaniĝis je la 31-a de aŭgusto, 1979. Informiĝinte pri tio, diversrondaj personoj de Japanio, precipe infanoj, telefonis, telegrafis aŭ skribis leterojn unuj post aliaj al la Uena Zoologia Ĝardeno por esprimi sian profundan zorgon. Iuj eĉ iris al la ĝardeno por rigardi ĝin aŭ donaci medicinaĵojn. La 1-an de septembro, antaŭ la domo de pandoj la vico de la atendantoj por ĝin rigardi estis longega kaj nombris 40,000 personojn.

En la noktomezo de la 4-a de septembro, Komori, la estro de



Huan Huan en speciala aviadilo al Japanio

Ĉinaj kaj japanaj raportistoj konkure fotas Huan Huan.




la Uena Zoologia Ĝardeno, anoncis, kun larmoj en la okuloj, ke Lan Lan mortis malfeliĉe pro malsano. La doloriga informo rapide cirkulis tra la tuta Japanio. Je la 6-a horo matene, ĉirkaŭ 300 infanoj unuaj venis al la zoo. La atendanta kolono iom post iom longiĝis kaj fariĝis senfina. Iuj portis funebran brakrubandon kaj pli multaj estis plorantaj. Oni alportis fruktojn, freŝajn florojn kaj aliajn oferaĵojn, iuj voĉlegis siajn funebrajn artikolojn kaj pli multaj silentis kun kunmetitaj manoj kaj mallevita kapo, adiaŭante Lan Lan.

La matenaj, tagmezaj kaj vesperaj jurnalaj de Tokio laŭhore raportis pri la morto de Lan Lan kaj pri la funebrado. Ĉiuj fotoj aperigitaj en tiuj jurnalaj estis indikitaj per la konkreta tempo.

Dum la 5 maltrankviligaj tagoj de ĝia malsaniĝo ĝis la morto, raportoj pri la malsano de Lan Lan estis senditaj rekte al la estro de la Kabineta Kancelario. En tiu tempo la koncernaj fakoj prenis diversajn urĝrimedojn por savi Lan Lan, kaj ankaŭ la urbestro de Tokio venis al la zoo kaj pridemandis ĝian malsanon. Post la morto de la pandino Lan Lan, ĉefministro Ohira diris al la jurnalistoj en la parlamento: "Tio estas tre bedaŭrinda."

III

De tiam Kang Kang vivis solece. La japana popolo tre bedaŭris, ke la pando, rara donaco de la ĉina popolo, ne povas generi en Japanio, kaj varme



Huan Huan en la Uena Zoologia Ĝardeno de Tokio

esperis, ke la ĉina popolo donacos plian pandinon por ke ĝi vivu pare kun Kang Kang. La ĉina popolo klare konis la koron de la japana popolo. En oktobro de 1979, nia Ŝtata Konsilantaro speciale ordonis ke la koncernaj institucioj elektu novan edzinon por Kang Kang. La Pekina Zoologia Ĝardeno kaj koncernaj institucioj zorgeme elektis la bonsanan pandinon Huan Huan, samaĝan kiel Kang Kang. En la lasta decembro, kiam ĉefministro Ohira vizitis Ĉinion, la pandino Huan Huan estis donacita al la japana popolo.

La 29-an de januaro, Huan Huan estis venigita al Tokio per japana speciala aviadilo kaj eskortita de du policaj aŭtoj al la Uena Zoologia Ĝardeno. En tiu tago, antaŭ la pordo de la zoo kolektiĝis centoj da urbanoj kaj ĵurnalistoj de pli ol cent novaj-institucioj, atendante alvenon de la pandino Huan Huan. Tuj post ĝia alveno, aŭdiĝis en la homamasoj varma aplaŭdado. Kaj oni kriis gaje: “Alvenis Huan Huan, alvenis la novedzino.”

Gajeco ekbrilis sur la vizaĝoj de la atendantoj.

La 6-an de februaro, akompanate de Kang Kang, Huan Huan aperis antaŭ la multnombraj rigardantoj kiuj delonge deziris ĝian alvenon. Je la 10-a horo antaŭtagmeze, oni okazigis sur la placo antaŭ la panda domo solenan bonvenan ceremonion. Sur la fono de la podio estis la naciaj flagoj de ambaŭ landoj kaj horizontala rubando kun vortoj “Bonvenon al Huan Huan”.

La ceremonion ĉeestis ankaŭ Kojiĉi Kato, vicestro de la Kabineta Kancelario, Ĝuro Macumoto, vicestro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj, Ŝuniĉi Suzuki, urbestro de Tokio, Jiĉiro Takahaŝi, prezidanto de la urba parlamento de Tokio, la ĉina ambasadoro en Japanio Fu Hao kaj pli ol 1,200 rigardantoj. La japanaj mastroj kaj la ĉina gasto deziris en siaj paroladoj, ke Huan Huan kaj Kang Kang sane kresku por la amikeco inter Japanio kaj Ĉinio kaj pli frue nasku idon.

Je 40 minutoj post la 10-a horo, iu knabino malligis grandan koloran globon pendigitan super la panda domo, kaj el ĝi malrapide falis diverskoloraj paperrubandetoj kaj paperpecoj. Fine venis la tempo longe atendata. En tiu momento miloj da rigardantoj el diversaj lokoj de Japanio en longa kolono svarmis al la pandino Huan Huan, kaj la gastama Huan Huan trankvile promenadis tien kaj reen antaŭ la rigardantoj kaj ĵurnalistoj. Inter la homamasoj aŭdiĝis ĝojkrioj kaj ridoj.





Sopeno

Memore al la granda muzikisto Ŝopeno

sajn okupantojn evakui Varsovion. Ŝopeno estis multe inspirita de tiu grandioza naciliberiga batalo kaj samtempe sentis bedaŭron kaj maltrankvilon pro sia nepartopreno en la batalo. Tiam la aŭtoritatoj de Vieno malkaŝe alprenis malamikan sintenon al la pola popolo, kaj Ŝopeno devis forlasi Vienon kaj veturis al Parizo en julio de 1831. Tie li akiris al si grandan famon. La kvardekaj jaroj estis matura periodo de Ŝopeno en lia verkado, en kiu li kreis ĉiujn siajn plej gravajn verkojn. Liaj verkoj karakteriziĝas per profunda patriotismo, neelĉerpebla revolucia vervo kaj frapa nacia stilo.

En la lasta duono de sia vivo Ŝopeno rifuĝis eksterlande, tamen liaj koro kaj sorto ĉiam ligiĝis kun la patrolando. En lia revolucia etudo en C Minora profunde montriĝis malamo de la komponisto al la fremda subpremado kaj liaj malĝojo kaj senkompara revolucia entuziasmo. Plejparto de liaj polkoj kun brava spirito kaj neelĉerpebla ritmoj estas multe stimula. La mazurkoj de Ŝopeno des pli

LA 22-a de februaro de la kuranta jaro estis la 170-a datreveno de la naskiĝo de la granda pola pianisto kaj komponisto F. F. Ŝopeno (Chopin). Por memori lin la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, la Ĉina-Pola Amikeca Asocio kaj la Ĉina Muzikista Asocio kune aranĝis koncerton de verkoj de Ŝopeno. En ĝi Zhao Wei kaj Wu Ying, kiuj ĉeestis la Dekan Internacian Ŝopenan Pianan Konkurson, sole ludis respektive “La Unuan Pianan Konĉerton en E Minora” kaj “La Duan Pianan Konĉerton en F Minora” de Ŝopeno.

Ŝopeno naskiĝis en la frua periodo de la 19-a jarcento, kiam la pola popolo suferadis de la fremdlandaj agresado kaj subpremado. La naciliberiga movado

de la pola popolo edukis la muzikiston, tiel ke liaj verkoj elspiris fortan patriotismon kaj kuraĝigis la polan popolon en ĝia batalo por la nacia sendependeco, libero kaj feliĉo.

En la komenco de novembro de 1930, Ŝopeno forlasis sian patrolandon por veturi al Vieno. Tiam li kiel pianisto jam ĝuis renomon en Varsovio. Per okazo de koncertoj li akiris monon por vojaĝi al Vieno. Ĉe la adiaŭo oni donacis al li arĝentan pokalon plenigitan per tero de Pollando, esperante, ke li ĉiam tenos la patrolandon en sia koro. Nelonge post kiam Ŝopeno atingis Vienon, je la fino de novembro eksplodis en Pollando la varsovia insurekcio kontraŭ la sklavigo de la cara Rusio. La insurekcio sukcese devigis la ru-

esprimas lian amon kaj sopiron al la patrolando.

La verkoj de Ŝopeno plene ekspluatis la superecon de piano kaj formis sian kantecan stilon kaj disvolvis uzadon de pedalo de tiu instrumento. Ŝopeno opiniis, ke melodio estas la animo de muziko, kaj evitis malbonan sekvaĵon de troa kolorigo fare de iuj romantismaj komponistoj. Li uzis propran romantismon en perfekta kaj strikta formo de klasikismo.

Dum la vojaĝo en Pollando en la pasinta jaro mi vizitis la malnovan loĝejon de Ŝopeno. Oni diris, ke loĝante tie Ŝopeno ofte ĉeestis tieajn kamparanajn balojn kaj ludis oberekojn kaj mazurkojn. Kiam li studis en mezlernejo, li tre ŝatis literaturon kaj historion. Pro amo al la nacia muziko kaj nacia kulturo de Pollando, ĉiuj liaj verkoj saturiĝis per nacia stilo kaj karakterizaj trajtoj de Pollando kaj fariĝis



Wu Ying ludas pianan koncerton de Sopeno.

valorajoj en la monda kultura trezorejo.

Ŝopeno estas unu el la komponistoj bone konataj kaj ŝatataj de la ĉina popolo, ĉar liaj verkoj strikte ligiĝas kun avangardaj pensoj de lia tempo kaj batalspirito kontraŭ fremda regado. Iuj liberaj ritmoj, disvolvaĵoj de

melodioj kaj variaĵoj uzitaj en liaj verkoj havas similecon kun iuj kreaĵoj de la ĉina tradicia nacia muziko, kaj pro tio la ĉina popolo sentas liajn verkojn facile kompreneblaj kaj akcepteblaj.

* La aŭtoro estas vicprezidanto de la Ĉina Muzikista Asocio.





Kamarado Sekelj kaj beijing-aj esperantistoj

FONDIĜIS LA CHONGQING-A ESPERANTA ASOCIO

Je la 30-a de marto, fondiĝis la nomita asocio. En la kunveno de la fondiĝo, oni aprobis la statuton kaj elektis la gvidantaron. Li Ren, konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicrektoro de la 3-a Normala Instituto de Chongqing (Ĉongking), estis elektita kiel prezidanto. En la kunveno li faris raporton pri laboro de la Chongqing-a Esperanta Asocio post ĝia fondiĝo. La kunveno ricevis gratulajn telegramojn kaj leterojn de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj diverslokaj Esperantaj organizoj kaj individuoj. Huang Youfan, estro de la Propaganda Departemento de la Chongqing-a Komitato de KPC, speciale ĉeestis kaj gratulis la kunvenon.

Ĉe la fondiĝo de Chongqing-a Esperanta Asocio

PROFESORO RALPH A. LEWIN VIZITIS ĈINION

La usona esperantisto kaj oceano-biologo prof. Ralph A. Lewin kaj lia edzino Lanna Cheng vizitis Ĉinion en la unua tagdeko de aprilo laŭ invito de la Oceanologia Buroo de Ĉinio. Dum vizito en Beijing (Pekino) li kunsidis kun tieaj esperantistoj. Prof. Zhou Yao, ĉina entomologo, veturis speciale de Shaanxi (Ŝenhi)-provinco al Beijing por intervidi kun ili. Antaŭ unu jaro Ralph A. Lewin kaj lia edzino komencis korespondi kun Zhou Yao pri scienco kaj ili fariĝis bonaj amikoj.



Profesoro Ralph A. Lewin (la maldekstra) kaj lia edzino Lanna Cheng (la unua de dekstre) kaj beijing-aj esperantistoj en kunsido

TIBOR SEKELJ EN ĈINIO

En marto de la kuranta jaro, kamarado Tibor Sekelj, reprezentanto de la Jugoslavia Esperanto-Ligo, sekretario de la Konstanta Konsilantaro de Etnologiaj Muzeoj de Unesko kaj magistro de muzeologio, faris 18-tagan viziton al Ĉinio laŭ invito de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Jam en 1957, kamarado Sekelj vizitis Ĉinion. Dum ĉi-foja revizito li pririgardis Beijing (Pekino), Chengdu (Ĉengdu), ĉefurbon de Sichuan-provinco, Xi'an (Hi'an), fame konatan antikvan ĉefurbon de Ĉinio, kaj la faman ŝtonan kavernaron Yungang apud la urbo Datong de Shanxi (Ŝanhi)-provinco.

Beijing-aj kaj Chengdu-aj esperantistoj okazigis kunsidojn por lin bonvenigi. La lasta faris raportojn pri la Esperanta movado de Jugoslavio kaj pri sia vojaĝo en Latinameriko.

Kamarado Sekelj havis fakan kunsidon kun ĉinaj muzeologoj kaj en kunsido kun laborantoj de nia redakcio li donis multajn bonajn proponojn.

SHANXI-A ESP-LABOR-KUNVENO

En la lasta marto, la nomita kunveno okazis en Taiyuan (Tajjuan), ĉefurbo de Shanxi-provinco. Ĝin ĉeestis kamaradoj el la Buroo de Eksteraj Aferoj, Buroo de Ekstera



Shanxi-a Esp-a Labor-kunveno

Komerco, Turisma Servo, Ĝenerala Laborista Sindikato kaj Sociologia Instituto de la provinco, la Shanxi-a Universitato kaj la provinca biblioteko. Zhang Deyuan, inĝeniero de la Taiyuan-a Fabriko de Minejaj Maŝinoj faris raporton en la kunveno. Li rememoris la historion de la provinca Esperanta movado, konigis la trajtojn de Esperanto kaj diris kiel servi al la patrolando per Esperanto. La kunvenon ĉeestis Liu Guanwen, vicestro de la Propaganda Departemento de la Shanxi-a Partia Komitato de KPĈ, kaj Wen Duanzheng de la Sociologia Instituto de la provinco. En sia parolado, ili esprimis subtenon al la Esperanta laboro kaj kuraĝigis, ke oni kulturu esperantistojn. Post la kunveno fondiĝis la Taiyuan-a Esperanta Grupo.

PRELEGOJ PRI ESPERANTO EN NANCHANG

La Ĝenerala Laborista Sindikato kaj la Kultura Domo de Nanchang (Nanĉang), ĉefurbo de Jiangxi (Gianghi)-provinco, aranĝis tri Esperantajn prelegojn en la lasta marto. La prelegoj estis faritaj de Gui Wenbo, instruisto de la 11-a Mezlernejo de la urbo. En siaj prelegoj li konigis Esperanton kaj la historion de la Esperanta movado kaj metodon pri lernado de Esperanto. La Jiangxi-a Tagjurnalo

publikigis lian artikolon "Ĉu vi scias Esperanton?"

PLIAJ ESPERANTAJ KURSOJ

De la kuranta jaro, iuj grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio starigis Esperantajn kursojn. La urbo Nanning, ĉefurbo de la Guangxi (Guanghi)-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, starigis Esperantan kurson en la lasta marto. Plejparto de la kursanoj estas kadroj, laboristoj, mezlernejaj instruistoj kaj studentoj el la fremdlingva fakultato de la Guangxi-a Universitato.

La Pedagogia Lernejo Xiaozhuang de Nanjing (Nankino) en Jiangsu (Giangsu)-provinco fondis Esperantan kurson, kiun vizitis pli ol 30 lernejanoj.

La Esperanta kurso de la urbo Bengbu de Anhui-provinco



La urbo Bengbu de Anhui-provinco fondis Esperantan kurson kun 65 kursanoj. La kurso estas starigita de la Sciencista Asocio de la urbo, kaj ĝiaj lernantoj estas rekomenditaj de siaj laborunuoj, kiuj pagas por ili la lernokoston.

Ankaŭ en la urbo Anshun de Guizhou (Gujĝoŭ)-provinco fondiĝis Esperanta kurso kun 140 kursanoj. La kurso nun jam finiĝis.

La Guangxi-a Geologia Esplora Taĉmento starigis en marto de la kuranta jaro mallongan Esperantan kurson. Ĝin vizitis inĝenieroj, teknikistoj, laboristoj kaj instruistoj, kun "Fundamenta Kurso de Esperanto" de Tikos kiel sia lernolibro.

NOVAJ MEMBROJ DE LA ESP-ASOCIO DE LA INTERNA MONGOLIO

En februaro ĉijare, la Esperanta Asocio de la Interna Mongolio akceptis 69 esperantistojn kiel novajn membrojn. La nomlisto estis publikigita en la kunveno de finiĝo de Esperanta kurso starigita de la nomita asocio en la lasta januaro, en kiu lernis pli ol 130 kursanoj, plejparte instruistoj kaj studentoj el la Universitato de Interna Mongolio, la Normala Instituto de Interna Mongolio kaj la Pedagogia Lernejo kaj mezlernejaj instruistoj.

La Esperanta kurso de la Interna Mongolio



TITO DISTINGIS ESPERANTO-ORGANIZAJON

Okaze de la 30-jara fondiĝo kaj sukcesa agado en disvastigo de la Internacia Lingvo kaj kontribuo al konatigo kaj proksimigo de jugoslaviaj popoloj kaj nacioj kun popoloj de aliaj landoj, prezidanto de SFR Jugoslavio Josip Broz Tito distingis Esperanto-Ligon de Bosnio kaj Hercegovino per la Ordeno pro meritoj por popolo kun arĝenta stelo. Tiun ĉi altan ŝtatan rekonon transdonis al la Ligo je la 10-a de novembro 1979 Brano Miljuš, prezidanto de la Socialisma Junulara Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. Dum la solenaĵo estis ankaŭ transdonitaj rekonaj de la Esperanto-Ligo al ties 47 meritplenaj aktivuloj kaj organizaĵoj.

ESPERANTO EN NORVEGAJ LERNEJOJ

Dum kelkaj jaroj Esperanto estis elektebla fako en la gejunulaj lernejoj en Norvegujo. Nun, nia lingvo

estas instruata en 3 gejunulaj lernejoj kaj 1 gimnazio. Meze en januaro venis ĝojiga informo, ke la gimnazio en Sarpsborg decidis oficiale instrui Esperanton dum la venonta jaro. La lernejo devas starigi du paralelajn klasojn, ĉar tro multe da interesigantoj sin anoncis. La oficialigo de Esperanto en la gimnazio estas la plej grava paŝo en la direkto, kiu montras al oficialigo.

DU ĈINAJ REPRESENTANTOJ PARTOPRENIS EN ESPERANTA AKTIVADO DE MADAGASKARO

Okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro organizis Ekspozicion dum la lasta decembro en la ĉefurbo. La unusemajna aranĝo, ne tro longa aŭ ambicia, sed iom prestiĝa, altiris la atenton de publiko. Ĝi brile sukcesis. La partopreno de du reprezentantoj de la ĉina ambasado en Madagaskaro dum la oficiala malfermo estis tre rimarkinda, kaj la ĉinaj gastoj estis kontentaj vidi la agadon de la organizo. Post tio prezidanto kaj vicprezidanto de la organizo s-roj Rabevazaha Désiré kaj Rakotoarisolo Aimé vizitis la konsilianon pri kulturo de la ĉina ambasado. La diskuto okazis en

frata etoso, kaj la ĉina gastiganto esperas efikan kunlaboradon de ĈEL kaj JEOM.

LA PARLAMENTA KOMISIONO DE HUNGARIO TRAKTIS ESPERANTON

La Ministerio pri Instruado de Hungario, pere de d-rino M. Hanga (vicministro), prezentis al la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento detalan kaj favoran raporton pri la stato kaj perspektivoj de la instruado de Esperanto en diversnivelaĵoj de tiu lando. La raporto estis diskutita kaj akceptita dum la kunsido de la Kultura Komisiono je la 14-a de decembro, 1979. La sekretario de HEA, T. Vasko, atentigis, ke Esperanto havas aparte traktindan popolklerigan rolon. Responde al tiu punkto, J. Geczi, prezidanto de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento, promesis, ke la Komisiono revenos poste al la temo kaj dediĉos atenton al la kleriga kaj kultura roloj de Esperanto.

SAT-KONGRESO EN RIJEKA

La 53-a Kongreso de SAT okazos de la 19-a ĝis la 25-a de julio, 1980, en Rijeka de Jugoslavio. Ĝia kongreso jam dufoje prenis la lokon en tiu lando. La ĉijara kongreso multe interesas esperantistojn el la najbaraj landoj Italio kaj Aŭstrio. La preparlaboroj por la kongreso jam komenciĝis kaj nun iras glate.

ESPERANTO-KURSOJ EN HISPANAJ LERNEJOJ

En Hispanio funkcias Esperanto-kursoj en 81 diversgradaj lernejoj, inkluzive plurajn universitatojn. La landa sekcio de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj nombras pli ol 300 aktivajn membrojn. Krome, ĉ. 400 pedagogoj kaj studentoj aliĝis al la senpagaj korespondaj Esperanto-kursoj.



Junaj geesperantistoj de Madagaskaro kantas "La Esperon".

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Sunleviĝo

de JOSE MO SANCHEZ (Hispanio)




Vintra Vesperruĝo

de OTTO BÖHM (FGR)




Naŭdraka Ekрана Muro en Beihai-parko

La ekрана muro estis konstruita en 1756 p. K. Ĝi altas 5 metrojn, longas 27 metrojn kaj dikas 1,2 metrojn. La surfaco de la muro estas garnita per koloraj glazuritaj brikoj. La bildoj sur ambaŭ flankoj de la muro prezentas respektive 9 drakojn naĝantajn en ondoj.



Leonoj en la Imperiestra

Palaco




Ŝtona leono



Bronza leono



Orumitaj bronza leonoj





8152

世界语《中国报道》一九八〇年第六期（本刊代号：二——九一五）

